Esperanto Fajnigita

Stephan Schneider

22–a de junio, 2010

Enhavo

0.1 Regulo 0: Ortografio 6
0.1.1 h-Sistemo: 6
0.1.2 Okcidenteŭropa Ortografio 6
0.1.3 Ekzercigoj kaj Distingigoj 8

1 Regulo 1: Artikoloj **9**
1.1 *ĉi* kiel Artikolo 9
1.2 a*jn* kiel Artikolo 9
1.3 *unu* (ne) kiel Artikolo 9
1.4 *la* kiel Artikolo 10
1.4.1 *la* kiel Postpozicia Artikolo 10
1.4.2 Ekzercigoj kaj Distingigoj 10

2 Regulo 2: Substantivoj **11**
2.1 Kazoj 11
2.1.1 Nominativo 11
2.1.2 Genitivo 11
2.1.3 Dativo 11
2.1.4 Akuzativo 11
2.1.5 Instrumentalo 12
2.1.6 Lokativo 12
2.1.7 Vokativo 12
2.1.8 Ergativo 12
2.1.9 Topikalo 13
2.2 Genroj 13
2.2.1 Virgenro 13
2.2.2 Ingenro 14
2.2.3 Ambaŭgenro 14
2.2.4 Ekzercigoj kaj Distingigoj 14

3 Regulo 3: Adjektivoj **15**
3.1 Adjektivo kiel Genitivo 15
3.2 Proporcio: *ju* kaj *des* 15
3.3 Kontrasto: *ol* 15
3.3.1 Ekzercigoj kaj Distingigoj 15

4 Regulo 4: Numeraloj **16**
4.1 -*a* en Numeraloj 16
4.2 -*u* en *unu* 16
4.3 -*t*- en Ordinaloj 17
4.4 -*esm*- en Ordinaloj 17
4.5 -*obl*- en Numeraloj 18
4.6 -*on*- en Numeraloj 18
4.7 -*op*- en Numeraloj 18
4.8 Tra Bruo 18
4.8.1 Ekzercigoj kaj Distingigoj 18

5 Regulo 5: Personaj Pronomoj **19**
5.1 Distingoj de la 2-a Persono . . . 19
5.2 Distingoj de la 3-a Persono . . . 19
5.3 *i-* en Plurala Formo . . . 19
5.4 Tra Bruo . . . 20
5.5 Konjugacio . . . 20
5.6 *o-* en Ĝentila Formo . . . 21
5.7 Transcenda Formo . . . 21
5.8 Dialekto . . . 21
5.8.1 Ekzercigoj kaj Distingigoj . . . 22

6 Regulo 6: Verboj **23**
6.1 Indikativo . . . 23
6.1.1 Aktivo . . . 23
6.1.2 Pasivo . . . 23
6.1.3 Interaktivo . . . 24
6.1.4 Interpasivo . . . 24
6.2 Konjunktivo . . . 24
6.3 Imperativo . . . 24
6.4 Infinitivo . . . 25
6.4.1 Infinitivo kiel Komplemento de Frazo . . . 25
6.4.2 Infinitivo kiel Objekto . . . 25
6.4.3 Infinitivo kiel Argumento de Prepozicio . . . 25
6.4.4 Infinitivo kiel Subjekto . . . 25
6.5 Distributivo . . . 26
6.6 Aspekto . . . 26
6.6.1 Ekzercigoj kaj Distingigoj . . . 26

7 Regulo 7: Adverboj **27**
7.1 Konstato: *jes*, *ne* kaj *mal* . . . 27
7.2 *-' al* kaj *aŭ* . . . 27
7.2.1 *-' al* ĉe Adverboj . . . 27
7.2.2 *-aŭ* en Prepozicioj . . . 28
7.2.3 *-aŭ* en Adverboj . . . 28
7.2.4 *-aŭ-* en Verboj . . . 29
7.2.5 Ekzercigoj kaj Distingigoj . . . 29

8 Regulo 8: Prepozicioj **30**
8.1 Alto . . . 30
8.1.1 *super* kaj *sub* . . . 30
8.1.2 *sor*, *sur* kaj *sob* . . . 30
8.2 Flanko kaj Surfaco . . . 30
8.2.1 *apud* kaj *an* . . . 30
8.2.2 *na* kaj *pri* . . . 31
8.3 Sfero, Cirklo kaj Linio . . . 31
8.3.1 *um' al* kaj *ĉirkaŭ* . . . 31
8.3.2 *fra* . . . 32
8.3.3 *en*, *ekster* kaj *el* . . . 32
8.3.4 *inter* kaj *krom* . . . 32
8.4 Tempo . . . 33

8.4.1 *dum*, *pre* kaj *pos* . . . 33
8.4.2 *antaŭ* . . . 33
8.4.3 *komenc* kaj *fin* . . . 33
8.4.4 *ek* kaj *ĉes* . . . 33
8.5 Utilo . . . 33
8.5.1 *por* kaj *kontraŭ* . . . 33
8.5.2 *za* kaj *re* . . . 34
8.5.3 *dank' al* kaj *pro* . . . 34
8.5.4 *voj* kaj *tras* . . . 34
8.5.5 *per* kaj *tra* . . . 34
8.5.6 *laŭ* kaj *preter* . . . 34
8.6 Distanco kaj Proksimo . . . 35
8.6.1 *ab* kaj *ĝis*, *de* kaj *al*, *par* kaj *in* . . . 35
8.6.2 *da* kaj *do*, *di* kaj *vic* . . . 35
8.6.3 *dis* kaj *ko*, *for* kaj *ĉe* . . . 36
8.6.4 *sen* kaj *kun*, *eks* kaj *ra* . . . 37
8.6.5 Ekzercigoj kaj Distingigoj . . . 37

9 Regulo 9: Prononco **39**
9.1 Literoj kaj Mallongigoj . . . 39

10 Regulo 10: Akcento **40**
10.0.1 Ekzercigoj kaj Distingigoj . . . 40

11 Regulo 11: Vortofarado **41**
11.1 Verboj el Substantivoj . . . 41
11.1.1 *-il-* kaj *-uz-* . . . 41
11.1.2 *-um-* kaj *-iz-* . . . 41
11.1.3 *-al-* kaj *-iz-* . . . 41
11.1.4 *-aŭ-* kaj *-iz-* . . . 41
11.1.5 *-aĵ-* kaj *-if-* . . . 41
11.1.6 *-al-* kaj *-if-* . . . 41
11.1.7 *-ec-* kaj *-if-* . . . 42
11.2 Substantivoj el Verboj . . . 42
11.2.1 *-ac-* kaj *-aĵ-* . . . 42
11.2.2 *-ad-* kaj *-aĵ-* . . . 42
11.2.3 *-ac-* kaj *-ec-* . . . 42
11.2.4 *-ad-* kaj *-ec-* . . . 42
11.3 Substantivoj el Substantivoj . . . 42
11.4 Sufiĉo kaj Neceso . . . 42

12 Regulo 12: Korelativoj **43**
12.1 Tradiciaj Tabelvortoj . . . 43
12.2 *kv-* en Refleksivaj Korelativoj . . . 43
12.3 *c-* en Proksimindikaj Korelativoj . . . 44
12.4 *n-* en Negaj Tabelvortoj . . . 44
12.5 *i-* en Nespecifaj Tabelvortoj . . . 44
12.5.1 Tabelvortaj Sufiksoj . . . 44
12.5.2 Alternativaj Korelativoj . . . 45

13 Reguloj 13: Direkto **46**

14 Reguloj 14: Mezuro **47**
14.1 Akuzativo anstataŭ Prepozicio 47
14.1.1 Ekzercigoj kaj Distingigoj 47
14.1.2 Ekzercigoj kaj Distingigoj 47

15 Regulo 15: Radikfarado **48**
15.1 Neologismoj kaj Internacieco 48
15.2 Ŝajnsufiksoj 49
15.2.1 *-al-* en Radiko 49
15.2.2 *-ari-* en Radiko 49
15.2.3 *-i-* en Radiko 49
15.2.4 *-if-* en Radiko 50
15.2.5 *-ik-* en Radiko 50
15.2.6 *-itat-* en Radiko 50
15.2.7 *-iv-* en Radiko 50
15.2.8 *-iz-* en Radiko 50
15.2.9 *-nt-* en Radiko 50
15.2.10 *-olog-* en Radiko 51
15.2.11 *-on-* en Radiko 51
15.2.12 *-or-* en Radiko 51
15.2.13 *-oz-* en Radiko 51
15.2.14 *-t-* en Radiko 51
15.2.15 *-ud-* en Radiko 52
15.2.16 *-ur-* en Radiko 52
15.3 Ŝajnprefiksoj 52
15.3.1 *ab-* en Radiko 52
15.3.2 *al-* en Radiko 52
15.3.3 *be-* en Radiko 52
15.3.4 *de-* en Radiko 52
15.3.5 *el-* en Radiko 52
15.3.6 *in-* en Radiko 53
15.3.7 *inter-* en Radiko 53
15.3.8 *re-* en Radiko 53
15.4 Ŝajnradikoj 53
15.4.1 Ekzercigoj kaj Distingigoj 54

16 Regulo 16: Nomoj **55**
16.0.2 Ekzercigoj kaj Distingigoj 55

0.1 Regulo 0: Ortografio

La alfabeto de Tradicia Esperanto[1] estas la latina alfabeto sen *q*, *w*, *x*, *y* kaj kun supersignaj literoj: la ĉapelitaj literoj *ĉ*, *ĝ*, *ĥ*, *ĵ*, *ŝ* kaj la hokita litero *ŭ*.

- ~~*q w x y*~~
- *a b c d e f g h i j k l m n o p r s t u v z*
- *ĉ ĝ ĥ ĵ ŝ ŭ*

0.1.1 h-Sistemo:

En Tradicia Esperanto eblas skribi *-h* anstataŭ ĉapeloj, kaj anstataŭ la hokita litero *ŭ* eblas simpla *u*.[2]

- *a b c d e f g h i j k l m n o p r s t u v z*
- *ch gh hh jh sh u*

0.1.2 Okcidenteŭropa Ortografio

En Esperanto Fajnigita eblas aliaj ortografioj. Por aperigi Esperantajn tekstojn pli okcidenteŭropaj, proponiĝas ĉi-sekva ortografio, kiu inkluzivas trajtojn de multaj okcidenteŭropaj lingvoj.

Tiu ĉi ortografio estas komplika kaj ambigua, ĉar ĝi aperigu Esperantajn tekstojn pli belaj por kiu kutimas okcidenteŭropajn ortografiojn. La celo de tia ortografio do ne estas internacieco. Por la uzado de Esperanto kiel lingvo por ĉiuj homoj (ne nur en okcidenta Eŭropo) nepre konsilindas la Tradiciesperanta supersigna alfabeto.

Supersignaj Literoj Okcidenteŭropaj lingvoj ofte ne havas supersignajn literojn.[3]

- [ĉ]: *ĉambro* → *chambro*
- [ĝ]: *ĝardeno* → *jardeno*
- [ĥ]: *ĥemio, eĥo* → *kemio, eko*
- [ĵ]: *ĵurnalo* → *jurnalo*[4]
- [ŝ]: *ŝipo, fiŝo* → *shipo, fisho*
- [ŭ]: *aŭto, Eŭropo* → *auto, Europo*[5]
- [j]: *trajno, jam* → *traino, iam*[6]

[1] respektive "Fundamenta Esperanto", "lingvouza Esperanto", "Zamenhofa Esperanto"; vidu ĉe [3]

[2] En praktika uzo, oni ofte skribas *-x* anstataŭ ĉapelo aŭ hoko.

[3] Supersignaj literoj estas imito de tipe orienteŭropa ortografia trajto, kiuj anstataŭas cirilajn literojn.

[4] Notu, ke, malgraŭ la prononca diferenco, [ĝ] kaj [ĵ] ĉi-kaze skribe ne plu distingeblas.

[5] Notu, ke, malgraŭ la prononca diferenco, [ŭ] kaj [u] ĉi-kaze skribe ne plu distingeblas.

[6] Por eviti konfuzon kun Tradiciaj tabelvortoj, konsilindas skribi *ya*, *yam*, *ye*, *yen*, *yes*, *yu*.

Latindevenaj Vortoj: Okcidenteŭropaj lingvoj ofte distingas la ortografion de latindevenaj vortoj.

- [kv]: *akvo, kvalito* → *aquo, qualito*
- [gv]: *lingvo, gvidi* → *linguo, guidi*[7]
- [ks]: *teksto* → *texto*
- [kz]: *ekzemplo* → *exemplo*

Grekdevenaj Vortoj: Okcidenteŭropaj lingvoj ofte distingas la ortografion de grekdevenaj vortoj.[8]

- [f]: *alfabeto* → *alphabeto*
- [t]: *temo* → *themo*
- [k]: *kaoso* → *chaoso*
- [ɦ]: *eĥo* → *eko*
- [i]: *sistemo* → *systemo*

Ĝermandevenaj Vortoj: Multaj ĝermanaj lingvoj uzas *w* anstataŭ [v] aŭ [ŭ].

- [v]: *vorto* → *worto*
- [ŭ]: *Ŭato* → *Wato*[9]

Molaj kaj Malmolaj Vokaloj: Okcidenteŭropaj lingvoj ofte distingas inter molaj vokaloj (t. e. *e*, *i*) kaj malmolaj vokaloj (t. e. *a*, *o*, *u*), kiuj ŝanĝas la prononcon respektive la skribon de [c], [k], [g] kaj [ĝ] respektive [ĵ].

- [c]: *centro, caro* → *centro, zaro*
- [k]: *kelke, kontrolo* → *quelque, controlo*
- [g]: *gitaro, gasto* → *guitaro, gasto*
- [ĝ]: *ĝentila, ĝardeno* → *gentila, jardeno*
- [ĵ]: *ĵeti, ĵurnalo* → *geti, jurnalo*

Intervokaleco: Okcidenteŭropaj lingvoj ofte distingas intervokalajn konsonantojn laŭ ilia voĉeco.

- [c]: *oceano, pico* → *oceano, pizzo*
- [s]: *maso* → *masso*
- [z]: *rozo* → *roso*

[7] Notu, ke, malgraŭ la prononca diferenco, [v] kaj [u] ĉi-kaze skribe ne plu distingeblas.
[8] Grekdevenaj vortoj eniris multajn okcidenteŭropajn lingvojn tra la latina lingvo.
[9] Notu, ke, malgraŭ la prononca diferenco, [ŭ] kaj [v] ĉi-kaze skribe ne plu distingeblas.

	mola	malmola
[k]	*que, qui*	*ca, co, cu*
[c]	*ce, ci*	*za, zo, zu*
[g]	*gue, gui*	*ga, go, gu*
[ĝ], [ĵ]	*ge, gi*	*ja, jo, ju*

Tabelo 1: [k], [c], [g] kaj [ĝ] / [ĵ] antaŭ molaj kaj malmolaj vokaloj

	apudkonsonanta	intervokala
[c]	*c-* / *z-*	*-c-* / *-zz-*
[s]	*s-*	*-ss-*
[z]	*z-*	*-s-*

Tabelo 2: [c], [s] kaj [z] apud konsonanto aŭ inter vokaloj

0.1.3 Ekzercigoj kaj Distingigoj

- [c] ↔ [ĉ]: *caro* ↔ *ĉaro*, *akcento* ↔ *akĉento*
- [g] ↔ [ĝ]: *generalo* ↔ *ĝenerala*, *plago* ↔ *plaĝo*
- [j] ↔ [ĵ]: *jaro* ↔ *ĵaro*
- [s] ↔ [ŝ]: *spuro* ↔ *ŝpuro*, *mi serĉas* ↔ *mi ŝercas*
- [u] ↔ [ŭ]: *praulo* ↔ *Paŭlo*, *posteulo* ↔ *Eŭropo*
- [c] ↔ [z]: *pico* ↔ *pizo*, *Pizo*
- [s] ↔ [z]: *proceso* ↔ *procezo*
- [ĝ] ↔ [ĵ]: *aĝo* ↔ *aĵo*
- [ĉ] ↔ [ĝ]: *ĉeno* ↔ *ĝeno*
- [ŝ] ↔ [ĝ]: *ŝuo* ↔ *ĝuo*
- [ĥ] ↔ [k]: *eĥo* ↔ *eko*

Skribi momon (sen -o) “Paŭl”, “Ŝtefan”, “Pjotr”

Prezenti sin: “Saluton Paŭl! Mi estas Ŝtefan.” mi estas

Demandi nomon: “Kiu estas vi?” kiu vi

1 Regulo 1: Artikoloj

Artikolo estas senŝanĝa vorteto, kiu indikas ion laŭ ĝia konateco al la parolanto kaj la aŭskultanto. La plej konata artikolo estas la difina artikolo *la*. En Esperanto Fajnigita, artikolo estas kombinebla kun tabelvorto kaj povas esti uzata memstare por roli kiel pronomo.

1.1 *ĉi* kiel Artikolo

En Esperanto Fajnigita *ĉi* estas artikolo, kiu indikas ion, kio estas pli konata al la parolanto ol al la aŭskultanto.

- *ĉi azeno*

Ĉar ĝi estas artikolo, *ĉi* estas kombinebla kun tabelvorto.[10]

- *tiu ĉi azeno / ĉi tiu azeno*

Ĉar ĝi estas artikolo, *ĉi* estas uzebla memstare kiel adverbo indikanta lokon pli proksiman al la parolanto ol al la aŭskultanto.

- *Ĉi ne estas akvo.*

1.2 *ajn* kiel Artikolo

En Esperanto Fajnigita la maldifina artikolo *ajn* indikas ion, kio estas nek konata nek koninda al la parolanto kaj al la aŭskultanto.

- *ajn azeno*

Ĉar ĝi estas artikolo, *ajn* estas kombinebla kun tabelvorto en **ambaŭ** pozicioj.

- *iu ajn azeno / ajn iu azeno*

1.3 *unu* (ne) kiel Artikolo

En Esperanto Fajnigita *unu* **ne** estas artikolo, nek nedifina nek duondifina, sed tabelvorto, ĉar unue, *unu* estas kombinebla kun artikolo kaj due, ĉar ĝi ne estas senŝanĝa.

- *la unuj azenoj*

Kvankam multaj okcidenteŭropaj kaj ĝermanaj lingvoj havas nedifinan artikolon, Esperanto ne havas.

- *Mi havas ~~unu~~ libron.*

[10] La Tradicia analizo estas, ke tabelvorto estas akompanebla de *ĉi*, kaj ke tiam la tabelvorto estas eliziebla.

1.4 *la* kiel Artikolo

La difina artikolo *la* indikas ion, kio estas konata kaj al la parolanto kaj al la aŭskultanto, respektive same abstrakta al ambaŭ.

- *la azeno*

Ĉar ĝi estas artikolo, *la* estas kombinebla kun tabelvorto en Esperanto Fajnigita.[11]

- *tiu la azeno / la tiu azeno*

Ĉar ĝi estas artikolo, *la* estas uzebla memstare kiel adverbo indikanta lokon same (mal)proksiman al la parolanto kiel al la aŭskultanto.

- *La ne estas akvo.*[12]

1.4.1 *la* kiel Postpozicia Artikolo

En Esperanto Fajnigita eblas por poezia stilo uzi la difinan artikolon *la* postpozicie.

- *la azeno* → *azenola*
- *la azenon* → *azenolan*
- *la azenojn* → *azenolajn*

1.4.2 Ekzercigoj kaj Distingigoj

- kiu ↔ kio: *kiu estas vi?* ↔ *kio estas vi?*
- kaj ↔ aŭ: *kaj* ↔ *aŭ*, *kaj . . . kaj . . .* ↔ *aŭ . . . aŭ . . .* kaj aŭ

Prezenti sian profesion: “Mi estas inĝeniero.”

Demandi profesion: “Kio estas vi?” / “Kiu estas la profesio de vi?” kio de

Demandi je jes aŭ ne: “Ĉu baleno estas fiŝo?” ĉu jes ne

[11] En Tradicia Esperanto, tio ne licas.

[12] En la lingvouzo de Tradicia Esperanto oni uzas anstataŭ *la* la adverbon *for* (nur post tabelvorto, ekzemple en *tie for*). Tiu uzo estas evitinda en Esperanto Fajnigita, ĉar *for* celas ion malaperintan, dum en *tie for* oni celas ion ankoraŭ indikeblan. *tie for* do signifas *tie malaperinte*, simetrie al *jen tie*, kiu signifas *tie ekaperinte*.

2 Regulo 2: Substantivoj

Substantivoj havas la finaĵon *-o*. Por la formado de la pluralo oni aldonas la finaĵon *-j*. Kazo estas indikata aŭ per finaĵo (ekzemple per *-n* por akuzativo) aŭ per prepozicio (ekzemple per *al* por dativo).

2.1 Kazoj

2.1.1 Nominativo

Por formi la nominativon necesas nek finaĵo nek prepozicio. Vidu ĉe 2.1.9.

- *amiko*

2.1.2 Genitivo

La genitivo estas formata per la prepozicio *de*. Eblas anstataŭe uzi la adjektivan finaĵon *-a*.

- *amiko de mi → amiko mia*
- *la ĉambro (de la numero) du → la dua ĉambro*

En Esperanto Fajnigita, eblas anstataŭe uzi la prepozicion *di*. La prepozicio *de* indikas malproksimiĝon kaj estas la malo de *al*.

- *amiko de mi → amiko di mi*[13]

2.1.3 Dativo

La dativo estas formata per la prepozicio *al*. En Esperanto Fajnigita eblas anstataŭe uzi la finaĵon *-m*.[14]

- *Mi helpas al amiko. → Mi helpas amikom.*
- *Mi helpas al amiko. → Mi helpas amikon.*

2.1.4 Akuzativo

La akuzativo estas formata per la finaĵo *-n*. En Esperanto Fajnigita eblas anstataŭe uzi la prepozicion *in*.

- *Mi vidas la domon. → Mi vidas in la domo.*

En Esperanto Fajnigita, la prepozicio *in* signifas tuŝon plenumitan. Ĝi estas la malo de *par*. Vidu ĉe 8.6.1, 13, 15.3.6.

- *Ŝi tuŝis lin in la brako.*

[13] En Tradicia Esperanto, *amiko de mi* estas ambigua, ĉu la amiko apartenas al mi aŭ ĉu li originas ĉe mi? Vidu ĉe 8.6.1

[14] Notu, ke per tio la Tradiciaj tabelvortoj je *-iom* kaj *-iam* ne plu distingeblas de dativaj *al -io* kaj *al -ia*. Vidu ĉe 12.5.

En Esperanto, eblas ellasi ĉian prepozicion kaj anstataŭi ĝin per akuativa *-n*. Por klareco, oni uzas la prepozicion kiel prefikson de la verbo, sed tio ne estas necesa.

- *Mi estis ĉe la festo.* → *Mi ĉeestis la feston.*
- *Li parolis al mi.* → *Li alparolis min.*
- *Mi helpas al amiko.* → *Mi helpas amikon.*

2.1.5 Instrumentalo

La instrumentalo estas formata per la prepozicio *per*. Eblas anstataŭe uzi la adverban finaĵon *-e*

- *Mi venas per trajno.* → *Mi venas trajne.*

2.1.6 Lokativo

La lokativo estas formata per la prepozicioj *en*, *ĉe*, *sur*, *dum*. Eblas anstataŭe uzi la adverban finaĵon *-e*.

- *Mi estas en mia hejmo.* → *Mi estas hejme.*

En Esperanto Fajnigita, eblas uzi la prepozicion *for*. Ĝi estas la malo de *ĉe*.

- *Mi estas for mia hejmo.* → *Mi estas malhejme.*

2.1.7 Vokativo

La vokativo estas formata per la interjekcio *ho*. En Esperanto Fajnigita eblas anstataŭe uzi la finaĵon *-u*. Vidu ĉe 5.1.

- *Ho amiko!* → *Amiku!*

2.1.8 Ergativo

Tradicia Esperanto ne havas ergativon. En Esperanto Fajnigita ĝi estas formebla per la prepozicio *par* aŭ per la finaĵo -k.

- *La kato mortigis la papagon.* → *La papago mortis par la kato.*
- *La kato mortigis la papagon.* → *La papago mortis la katok.*

En Esperanto Fajnigita, la prepozicio *par* signifas maltuŝon plenumotan. Ĝi estas la malo de *in*.

- *La pomo pendas par la branĉo.*

2.1.9 Topikalo

Tradicia Esperanto ne havas topikalon. En Esperanto Fajnigita ĝi estas formebla per la prepozicio[15] *se*. Tia konstruo estas alivortigebla per *se temas pri ...* aŭ *koncerne ...-n*. Notu, ke la resto de la frazo estas sen subjekto.

- *Mi ne ŝatas pomojn.* → *Se mi, ne ŝatas pomojn.*

Topikalo ne povas ricevi *n*-finaĵon.

- *Mi ne ŝatas pomojn.* → *Se pomoj, mi ne ŝatas.*

En moderna lingvouzo, oni uzas tiajn konstruojn sen *se*.

- *Se mi, ne ŝatas pomojn.* → *Mi, ne ŝatas pomojn.*
- *Se pomoj, mi ne ŝatas.* → *Pomoj, mi ne ŝatas.*

Notu, ke per tio nominativo, akuzativo kaj topikalo ne plu distingeblas, kio ŝajnas evitinda.

- *Mi ne ŝatas, se pomoj.* → *Mi ne ŝatas pomoj.*

Kiam *se* staras antaŭ frazo, ĝi rolas kiel en Tradicia Esperanto. En Esperanto Fajnigita, ĝi estas ellasebla.

- *Se vi venos, mi ĝojos.* → *Vi venos, mi ĝojos.*

	finaĵo	prepozicio
(nominativo)	-	-
genitivo	*-a*	*de*
dativo	*-m*	*al*
akuzativo	*-n*	*in*
instrumentalo	*-e*	*per*
lokativo	*-e*	*en, ĉe, sur, dum*
vokativo	*-u*	*ho*
ergativo	*-k*	*par*
topikalo	-	*se*

Tabelo 3: Kazoj formataj per finaĵo aŭ prepozicio

2.2 Genroj

2.2.1 Virgenro

Substantivoj, kiuj estas virgenraj, bezonas la sufikson *-in-* por formi ingenran formon. En Esperanto Fajnigita eblas antataŭe uzi la prefikson *fem-*.

- *sinjoro* $\xrightarrow{-in-}$ *sinjorino*
- *sinjoro* $\xrightarrow{fem-}$ *femsinjoro*

[15] Argumenteblas, ke *se* ne estas prepozicio sed partikulo, kaj ke topikalo ne estas propra kazo. Vidu ĉe 5.4.

2.2.2 Ingenro

Substantivoj, kiuj estas ingenraj, bezonas la prefikson *vir-* por formi virgenran formon. En Esperanto Fajnigita eblas anstataŭe uzi la sufikson *-iĉ-*.

- *damo* $\xrightarrow{vir-}$ *virdamo*
- *damo* $\xrightarrow{-iĉ-}$ *damiĉo*

2.2.3 Ambaŭgenro

Por formi ambaŭgenran formon, oni povas uzi la prefikson *ge-*. En Esperanto Fajnigita eblas anstataŭe uzi la sufikson *-un-*. Vidu ĉe 5.2.

- *amikoj* $\xrightarrow{ge-}$ *geamikoj*
- *amikoj* $\xrightarrow{-un-}$ *amikunoj*

	sufikso	prepozicio
ingenro	*-in-*	*fem-*
virgenro	*-iĉ-*	*vir-*
ambaŭgenro	*-un-*	*ge-*

Tabelo 4: Genroformoj per sufikso aŭ prefikso

2.2.4 Ekzercigoj kaj Distingigoj

- -j ↔ –: *pomoj* ↔ *pomo* -j
- -n ↔ –: *mi manĝas pomon* ↔ *pomo estas frukto* -n
- -in- ↔ –: *filo* ↔ *filino* -in-
- ge- ↔ –: *gepatroj* ↔ *patro kaj patrino*, *gefrato* ↔ *frato aŭ fratino* ge-
- unu ↔ –: *unu pomo kaj unu pomo estas du pomoj* ↔ *gepatroj estas patro kaj patrino* unu kaj du ge-

Demandi pri familianoj: “Ĉu vi havas filon aŭ filinon?”

Demandi detale pri familianoj: “Kiu estas la nomo de la filino de vi?” / “Kiun nomon havas la filino de vi?”

3 Regulo 3: Adjektivoj

La finaĵo de adjektivo estas -*a*.

3.1 Adjektivo kiel Genitivo

La finaĵo -*a* povas indiki apartenon.

- *la volo de la patrino → la patrina volo*

3.2 Proporcio: *ju* kaj *des*

Oni esprimas proporcion per *ju*, kiu indikas kondiĉon, kaj per *des*, kiu indikas konsekvencon.

- *ju pli da mono des pli da problemoj*

3.3 Kontrasto: *ol*

En Esperanto Fajnigita, la prepozicio *ol* signifas *kontraste al*, *kompare kun*.

- *Ŝi estas pli juna ol li.*

3.3.1 Ekzercigoj kaj Distingigoj

- -o ↔ -a: *aĝo* ↔ *aĝa* — -a
- mal- ↔ –: *juna* ↔ *maljuna* — mal-
- -et- ↔ -eg-: *varmeta* ↔ *varmega* — -et- -eg-
- tre ↔ tro: *tre* ↔ *tro* — tre tro
- de vi ↔ via: *la filino de vi* ↔ *via filino* — via

Demandi la aĝon: “Ĉu via filino estas tre juna?” / “Kiun aĝon havas via filino?” / “Kiom aĝa estas via filino?” / “Kiom da jaroj havas via filino?” — tre kiom da

Uzi pli kaj malpli “Ĉu vi estas pli aĝa ol via fratino?” — pli ol

Uzi plej “Ĉu vi estas la plej aĝa gefrato en via familio?”

4 Regulo 4: Numeraloj

La dek bazaj numeraloj estas *nul*, *unu*, *du*, *tri*, *kvar*, *kvin*, *ses*, *sep*, *ok*, *naŭ*. La plurdiĝitaj numeraloj estas *dek*, *cent*, *mil* kaj la numervortoj estas *miliono*, *miliardo* k. t. p.

4.1 -a en Numeraloj

En Tradicia Esperanto oni uzas la adjektivan finaĵon -*a* por formi ordinalojn el numeraloj kaj numervortoj.[16]

- *nul* $\xrightarrow{-a}$ *nula*
- *unu* $\xrightarrow{-a}$ *unua*
- *du* $\xrightarrow{-a}$ *dua*
- *tri* $\xrightarrow{-a}$ *tria*
- *kvar* $\xrightarrow{-a}$ *kvara*
- *kvin* $\xrightarrow{-a}$ *kvina*
- *ses* $\xrightarrow{-a}$ *sesa*
- *sep* $\xrightarrow{-a}$ *sepa*
- *ok* $\xrightarrow{-a}$ *oka*
- *naŭ* $\xrightarrow{-a}$ *naŭa*
- *dek* $\xrightarrow{-a}$ *deka*
- *cent* $\xrightarrow{-a}$ *centa*
- *mil* $\xrightarrow{-a}$ *mila*
- *miliono* $\xrightarrow{-a}$ *miliona*
- *miliardo* $\xrightarrow{-a}$ *miliarda*

4.2 -u en *unu*

En Tradicia Esperanto eblas uzi *unu* kvazaŭ tabelvorton.

- *Unu vidvino havis du filinojn.*

  Oni povas elizii la ŝajnfinaĵon -*u* en *unu*.[17]

- *unu* → *un'* → *un*

[16] La senpera uzado de -*a* en ordinaloj estas ebla en Esperanto Fajnigita, sed ne konsilata, ĉar ĝi povas kaŭzi miskomprenojn: ĉu *nula* signifas *je la nula fojo* aŭ *neniu*?

[17] En Esperanto Fajnigita, tiu elizio estas la normo, ĉar la ŝajnfinaĵo -*u* ne plu estas bezonata en tabelvortoj. Vidu ĉe 12.5.

La uzo de *un* kiel tabelvorto estas malkonsilata en Esperanto Fajnigita.[18] Por formi tabelvorton, oni uzu *un-* prefiksece kun *ula*. Pli konsilindas uzi *un* kun la adjektiva finaĵo *-a* (eblas eksplicite aldoni la sufikson *-op-* por (unuopula) kolektivo).

- *un vidvino* $\xrightarrow{-ul-}$ *unula vidvino*
- *un vidvino* $\xrightarrow{-a}$ *una vidvino* $\xrightarrow{-op-}$ *unopa vidvino*

4.3 *-t-* en Ordinaloj

Analoge al la vorto *triangulo* (t. e. *kuno da tri anguloj*) eblas en Esperanto Fajnigita formi vortojn kun la signifo de kuno da paŝoj per la sufikso *-t-*. Ili estas utilaj por esprimi muzikajn intervalojn. Oni povas derivi de ili a-formojn kun la signifo *je la (respektiva) paŝo*, t. e. ordinaloj.

- *nulpaŝo* $\xrightarrow{-t-}$ *nulto* $\xrightarrow{-a}$ *nulta*
- *unpaŝo* $\xrightarrow{-t-}$ *unto* $\xrightarrow{-a}$ *unta*
- *dupaŝo* $\xrightarrow{-t-}$ *duto* $\xrightarrow{-a}$ *duta*
- *tripaŝo* $\xrightarrow{-t-}$ *trito* $\xrightarrow{-a}$ *trita*
- *kvarpaŝo* $\xrightarrow{-t-}$ *kvarto* $\xrightarrow{-a}$ *kvarta*
- *kvinpaŝo* $\xrightarrow{-t-}$ *kvinto* $\xrightarrow{-a}$ *kvinta*
- *sespaŝo* $\xrightarrow{-t-}$ *sesto* $\xrightarrow{-a}$ *sesta*
- *seppaŝo* $\xrightarrow{-t-}$ *septo* $\xrightarrow{-a}$ *septa*
- *okpaŝo* $\xrightarrow{-t-}$ *okto* $\xrightarrow{-a}$ *okta*
- *naŭpaŝo* $\xrightarrow{-t-}$ *naŭto* $\xrightarrow{-a}$ *naŭta*

4.4 *-esm-* en Ordinaloj

En Esperanto Fajnigita eblas uzi por la plurdiĝitaj numeraloj *dek*, *cent*, *mil* kaj la numervortoj *miliono*, *miliardo* kaj tiel plu la sufikson *-esm-* por formi ordinalojn.

- *dek* $\xrightarrow{-esm-}$ *dekesma*
- *cent* $\xrightarrow{-esm-}$ *centesma*
- *mil* $\xrightarrow{-esm-}$ *milesma*
- *miliono* $\xrightarrow{-esm-}$ *milionesma*
- *miliardo* $\xrightarrow{-esm-}$ *miliardesma*

[18] La uzo de *unu* kiel tabelvorto en Tradicia Esperanto kaŭzas konfuzon: ĉu oni rajtas aldoni la akuzativan finaĵon *-n* al singulara *unu* (numeralo!), se oni devas aldoni *-n* al plurala *unuj* (tabelvorto!)?

4.5 *-obl-* en Numeraloj

Por esprimi multiplikon, oni uzas la sufikson *-obl-*.

- *du* $\xrightarrow{-obl-}$ *duoblo*

4.6 *-on-* en Numeraloj

Por esprimi frakcion, oni uzas la sufikson *-on-*.

- *du* $\xrightarrow{-on-}$ *duono*

4.7 *-op-* en Numeraloj

Por esprimi kolektivon kun certa kvanto, oni povas uzi la sufikson *-op-*, sed ĝi ne estas deviga en Esperanto Fajnigita.

- *du* $\xrightarrow{-o}$ *duo* $\xrightarrow{-op-}$ *duopo*

4.8 Tra Bruo

Tra bruo oni preferu pli klarajn formojn por *ses* kaj *sep*.

- *ses* → *sis*
- *sep* → *sepen*

4.8.1 Ekzercigoj kaj Distingigoj

- unu ↔ unua: *unu horo* ↔ *la unua horo*
- kiom ↔ kiam: *je la kioma horo* ↔ *kiam*

Demandi tempon: “Je la kioma horo ni manĝas?” / “Kiam ni manĝas?”

Respondi tempon: “Ni manĝas je la sepa.”

Uzi -on-: “je la sepa kaj duono”

unua

je

kioma

kiam

-on-

5 Regulo 5: Personaj Pronomoj

Personaj pronomoj en Esperanto havas la ŝajnfinaĵon *-i*. Ĝi estas parto de la radiko. La ĉefaj personaj pronomoj estas:

	singularo	pluralo
1-a persono	*mi*	*ni*
2-a persono	-	*vi*
3-a persono	*li*	*ili*

Tabelo 5: Bazaj personaj pronomoj

5.1 Distingoj de la 2-a Persono

En Tradicia Esperanto mankas persona pronomo por la 2-a persono en singularo. Oni uzas *vi* kaj por singularo kaj por pluralo. La persona pronomo *ci* foje uziĝas por karesa alparolo en singularo. En Esperanto Fajnigita, la persona pronomo *ti* uziĝas por la 2-a persono eksplicite en singularo.[19] Simetrie, la persona pronomo *ŭi* uziĝas por karesa alparolo en pluralo. Notu, ke (ironia) karesa alparolo ofte ŝajnas ofenda al nekonatulo.

	singularo	pluralo
1-a persono	*mi*	*ni*
2-a persono	*ti*	*vi*
(karese) 2-a persono	*ci*	*ŭi*
3-a persono	*li*	*ili*

Tabelo 6: Fajnigo kun karesaj formoj

En Esperanto Fajnigita, eblas alternativaj vokativaj formoj por la 2-a persono: *tu* kaj *vu*, respektive *cu* kaj *ŭu*. Vidu ĉe 2.1.7.

- ho ti! → tu!
- ho vi! → vu!

5.2 Distingoj de la 3-a Persono

En Tradicia Esperanto oni distingas la 3-an personon en singularo por inoj per *ŝi* kaj por infanoj, bestoj kaj objektoj per *ĝi*[20]. En Esperanto Fajnigita oni distingas ankaŭ por personoj per *ri*, por viroj per *hi* kaj por vivaĵoj/vivuloj per *ji*. La uzo de *ĝi* estas specife por objektoj kaj aferoj. Vidu ĉe 2.2

5.3 *i-* en Plurala Formo

En Esperanto Fajnigita la ŝajnprefikso *i-* povas esti uzata por formi pluralajn personajn pronomojn, analoge al *ili*.[21] Simetrie, oni povas uzi la pronomon *zi*

[19] Notu, ke per tio la genitiva *tia* ne plu distingeblas de la Tradicia tabelvorto *tia*. Vidu ĉe 12.5.

[20] Refleksiva uzo estas en ĉiuj kazoj per *si*

[21] Notu, ke plurala *ili* ne distingeblas de (ne-lingvouza) infinitivo *ili*, t. e. "*esti ilo*" aŭ "*funkciigi ilon*".

	singularo	pluralo
1-a persono	*mi*	*ni*
2-a persono	*ti*	*vi*
(karese) 2-a persono	*ci*	*ŭi*
3-a persono	*li*	*ili*
(laŭ sekso) 3-a persono	*ŝi, hi*	-
(laŭ konscio) 3-a persono	*ĝi, ĵi, ri*	-

Tabelo 7: Fajnigo kun distingoj laŭ sekso kaj konscio

anstataŭ *ili*.

	singularo	pluralo
1-a persono	*mi*	*ni (imi)*
2-a persono	*ti*	*vi (iti)*
(karese) 2-a persono	*ci*	*ŭi (ici)*
3-a persono	*li*	*ili (zi)*
(laŭ sekso) 3-a persono	*ŝi, hi*	*iŝi, ihi*
(laŭ konscio) 3-a persono	*ĝi, ĵi, ri*	*iĝi, iĵi, iri*

Tabelo 8: Fajnigo kun ŝajnprefikso *i-*

5.4 Tra Bruo

Tra bruo, konsilindas uzi ĉi-sekvajn formojn, kiuj estas la respektivaj topikaloj (vidu ĉe 2.1.9). La formoj kun la ŝajnprefikso *i-* estas preferindaj tra bruo, sed en Esperanto Fajnigita konsilindas uzi *-os* anstataŭ la ŝajnfinaĵo *-i* por pluralaj personaj pronomoj por eviti troan similon al la singularaj formoj. Tra bruo konsilindas prononci la singularajn personajn pronomojn kun *-e* anstataŭ *-i*, ekzemple *te* anstataŭ *ti*, ĉar *i* moligas la konsonanton similigante *t*, *c*, *ĉ*, *ĝ*, *ŝ*, *s* inter si.

(tra bruo)	singularo	pluralo
1-a persono	*me*	*nos (ime/imos)*
2-a persono	*te*	*vos (ite/itos)*
(karese) 2-a persono	*ce*	*ŭos (ice/icos)*
3-a persono	*le*	*ile, ilos (zos)*
(laŭ sekso) 3-a persono	*ŝe, he*	*iŝe/iŝos, ihe/ihos (zos)*
(laŭ konscio) 3-a persono	*ĝe, ĵe, re*	*iĝe/iĝos, iĵe/iĵos, ire/iros (zos)*

Tabelo 9: Fajnigo tra bruo

5.5 Konjugacio

En Esperanto Fajnigita eblas uzi pecojn de personaj pronomoj por formi konjugacion (en poezio). Ekzemple, por la unua persono singulara (*mi*), la verbo ne finiĝas per *-s*, sed per *-m*. Por la unua persono plurala (*ni*, respektive *imi/ime/imos*), la verbo finiĝas per *-mos*.

	singularo	pluralo
1-a persono	*amam*	*amamos*
2-a persono	*amat*	*amate*
(karese) 2-a persono	*amac*	*amace*
3-a persono	*amar*	*amaz*

Tabelo 10: Konjugacio (poezie)

5.6 *o-* en Ĝentila Formo

En Esperanto Fajnigita la ŝajnprefikso *o-* uziĝas por krei afablajn formojn. En Tradicia Esperanto oni uzas nur la formon *oni* por paroli pri si mem sen alparoli aŭ voki sin (plurale).

	singularo	pluralo
1-a persono	*omi*	*oni*
2-a persono	*oti*	*ovi*
(karese) 2-a persono	*oci*	*oŭi*
3-a persono	*oli*	*ozi*
(laŭ sekso) 3-a persono	*oŝi, ohi*	-
(laŭ konscio) 3-a persono	*oĝi, oĵi, ori*	-

Tabelo 11: Ĝentilaj formoj per la ŝajnprefikso *o-*

5.7 Transcenda Formo

Por paroli pri transcendaĵoj (Dio, la Fonto, la Potenco k. s.) eblas uzi la personan pronomon *I* (majuskle).

	(sennombro)
(senpersono)	*I*

Tabelo 12: Transcenda persona pronomo *I*

5.8 Dialekto

La dialekto **Adjuvilo** (vidu ĉe [2]) uzas pronomojn similajn al la topikalaj pronomoj en Esperanto Fajnigita.

- *mia domo → mea domo*

Adjuvilo uzas la ŝajnfinaĵon *-os*, kiu ne alprenas la finaĵon *-n* (vidu ĉe 2.1.9), por pluralaj substantivoj. Kohere, pluralaj adjektivoj ricevas la finaĵon *-as*, kiu same ne alprenas la finaĵon *-n*. Kohere, singularaj adjektivoj kaj substantivoj ne alprenas la finaĵon *-n*. Adjuvilo do ne havas akuzativon.

- *mian domon → mea domo*
- *miaj domoj → meas domos*

- *miajn domojn → meas domos*

Kohere, verboj ne finiĝas per *-s*, sed per *-n* en Adjuvilo (la finaĵo *-n* ja ĵus "liberiĝis").

- *Mia domo havas grandajn fenestrojn. → Mea domo havan grandas fenestros.*

La dialekto **Ido** (vidu ĉe [1]) uzas la ŝajnfinaĵon *-i* anstataŭ *-oj*.[22]

- *miaj domoj → mea domi*

Kohere, en Ido necesas uzi alian finaĵon ol *-i* por infinitivoj.

- *havi → havar*[23]

5.8.1 Ekzercigoj kaj Distingigoj

- lĭ ↔ ŝĭ

[22]Notu, ke Ido jes havas akuzativon. La finaĵo *-n* tamen ellasiĝas, kiam la rekta objekto sekvas la verbon.

[23]Notu, ke la finaĵo *-ar* en Ido estas akcentata. Ĝi interpreteblas do kiel substantivo sen *-o* kaj kun ellasita apostrofo (vidu ĉe 16). Tia substantivo, ekzemple *havar'*, do havas la sufikson *-ar-*, uzatan simile kiel la ŝajnvorteron *-i-* (vidu ĉe 15.2.3). Infinitivo en Ido, samkiel en Esperanto, ne povas ricevi la finaĵon *-n* (vidu ĉe 6.4.2).

6 Regulo 6: Verboj

6.1 Indikativo

La indikativo estas formata per la finaĵojoj *-as*, *-is* kaj *-os*.

- *Mi legas.*

La finaĵo *-as* indikas tion, kio **daŭre** aŭ **nun** okazas, ekzemple **hodiaŭ**. La finaĵo *-is* indikas tion, kio **jam** aŭ **ĵus** okazis, ekzemple **hieraŭ**. La finaĵo *-os* indikas tion, kio **ankoraŭ** aŭ **tuj** okazos, ekzemple **morgaŭ**.

-as	*daŭre*	*nun*	*hodiaŭ*
-is	*jam*	*ĵus*	*hieraŭ*
-os	*ankoraŭ*	*tuj*	*morgaŭ*

Tabelo 13: Tempoj

6.1.1 Aktivo

La aktivo estas formata per la sufiksoj *-ant-*, *-int-*, *-ont-*, kaj la adjektiva finaĵo *-a*.

- *Mi estas leganta.*

En Esperanto Fajnigita, oni povas krei modajn aktivajn adjektivojn, kiuj indikas agon povatan, volatan, devatan aŭ kutimatan.

- *legiva* (legipovanta)
- *legima* (legivolanta)
- *legema* (legidevanta)
- *legama* (legikutimanta)

Notu, ke *imo* kontraste al *volo* signifas (spontanean) inklinon; *emo* kontraste al *devo* signifas (kontraŭvolan) impulson; *amo* kontraste al *kutimo* signifas (naturan) tendencon.[24]

Anstataŭ *-iv-*, eblas eksperimente uzi *-om-*. Notu, ke en moderna lingvouzo, oni ofte uzas neologisman *-iv-* anstataŭ (kaj Fajnigitan kaj Tradiciesperantan) *-em-*. Vidu ĉe 15.2.7.

6.1.2 Pasivo

La pasivo estas formata per la sufiksoj *-at-*, *-it-*, *-ot-*, kaj la adjektiva finaĵo *-a*.

- *La libro estas legata.*

[24]Notu, ke skribe *gastamo*, t. e. la amo je gastoj, kaj *gastamo*, t. e. la kutimo esti gasto, ne estas distingeblaj. Tamen, en la prononco oni diferencas inter "*gast-amo*" kaj "*gas-tamo*". Por plia klareco, eblas diri *gastigamo* anstataŭ *gast-amo*.

Eblas indiki la aganton per la prepozicio *de*. En Esperanto Fajnigita konsilindas uzi la ergativan prepozicion *par*.[25]

- *La libro estas legata de mi.* → *La libro estas legata par mi.*

En Esperanto fajnigita, oni povas krei modajn pasivajn adjektivojn, kiuj indikas agon povatan, volatan, devatan aŭ kutimatan.

- *legebla* (legipovata)
- *leginda* (legivolata)
- *legenda* (legidevata)
- *leganda* (legikutimata)

Anstataŭ *-ebl-* eblas eksperimente uzi *-ond-*.

6.1.3 Interaktivo

La interaktivo estas formata per la sufikso *-ig-*.

- *Mi trinkigas la hundon.*

6.1.4 Interpasivo

La interpasivo estas formata per la sufikso *-iĝ-*.

- *La pordo fermiĝas.*

6.2 Konjunktivo

La konjunktivo estas formata per la finaĵo *-us*.

- *Se mi estus riĉa, mi aĉetus domon.*

En eksperimenta lingvouzo, eblas formi aktivan kaj pasivan adjektivojn je "*-unta*" kaj "*-uta*".

6.3 Imperativo

La imperativo estas formata per la finaĵo *-u*. En Esperanto Fajnigita eblas anstataŭe la finaĵo *-es*.

- *Venu!* → *Venes!*

En eksperimenta lingvouzo, eblas uzi la sufikson *-ent-*.

- *iu, kiu studu* → *iu, kiu studes* → *studento*

[25] Kelkaj uzas la neoficialan prepozicion *far*. Tiu uzo estas evitinda en Esperanto Fajnigita.

6.4 Infinitivo

La infinitivo de verbo estas formata per la finaĵo *-i*.

- *Ĉu esti aŭ ne esti?*

6.4.1 Infinitivo kiel Komplemento de Frazo

Infinitivo povas roli kiel komplemento de frazo kaj tiam aperas post akuzativo por indiki agon plenumatan aŭ plenumotan insitigitan aŭ perceptatan de la subjekto de la frazo.

- *Ŝi vidas la infanojn danci.* (Laŭ ŝi, la infanoj dancas.)
- *Ŝi petas la infanojn danci.* (Laŭ ŝi, la infanoj dancu.)
- *Ŝi helpas la infanojn danci.* (Dank' al ŝi, la infanoj dancos.)

Anstataŭ infinitivo eblas adjektivo, substantivo aŭ adverbo kiel komplemento de frazo.

- *Ŝi farbis la pordon verda.* (Pro ŝi, la pordo nun estas verda.)
- *Ŝi nomis la najbaron amiko.* (Laŭ ŝi, la najbaro nun estas amiko.)
- *Ŝi portis la biciklon for.* (Dank' al ŝi, la biciklo nun estas for.)

6.4.2 Infinitivo kiel Objekto

Kiam la infinitivo ne aperas post akuzativo, ĝi ne estas komplemento de la frazo, sed povas roli mem kiel rekta objekto. Ĝi tamen neniam alprenas la finaĵon *-n*.

- *Ŝi rajtigas la infanojn ludi.* (*ludi* estas komplemento de la frazo.)
- *Ŝi permesas al la infanoj ludi.* (*ludi* estas rekta objekto de la frazo.)

Kiel objekto, infinitivo daŭre indikas agon plenumatan aŭ plenumotan, ofte de la subjekto (se mankas nerekta objekto).

- *La infanoj rajtas ludi.* (La infanoj ludas aŭ ludos, ĉar ili rajtas.)

6.4.3 Infinitivo kiel Argumento de Prepozicio

Infinitivo povas esti argumento de prepozicio.

- *La infanoj ludas sen kanti.* (La infanoj ne kantas dum ili ludas.)

6.4.4 Infinitivo kiel Subjekto

Infinitivo povas esti la subjekto de frazo. Ĝi tiam ne indikas specifan agon plenumatan aŭ plenumotan.[26]

- *Kanti estas bele.* (Kantado estas bela (por tiu, kiu kantas).)

[26] Tamen, infinitivo neniam estas priskribebla per adjektivo. Estas malĝuste diri: **Kanti estas bela.**

6.5 Distributivo

La prepozicio *po* indikas unu fojon el vico da fojoj.

6.6 Aspekto

En Esperanto Fajnigita, eblas uzi la sufikson *-ac-* por indiki fojan agon, dum la sufikso *-ad-* indikas daŭran agon.

- *pafo* $\xrightarrow{-ac-}$ *pafaco*
- *dormo* $\xrightarrow{-ad-}$ *dormado*

Sen specifi la aspekton de ago (ĉu foja aŭ daŭra), eblas uzi sufikson *-ag-* en Esperanto Fajnigita.

- *spioni* $\xrightarrow{-ag-}$ *spionago*

6.6.1 Ekzercigoj kaj Distingigoj

- -is ↔ -os: *kiam vi alvenis?* ↔ *kiam vi foriros* -is -os
- -as ↔ -i: *kion vi faras?* ↔ *kion vi volas fari?* -i
- -as ↔ -us: *kion vi volas fari?* ↔ *kion vi ŝatus fari?* -us
- -as ↔ -u: *ĉu vi volas danci kun mi?* ↔ *bonvolu danci kun mi!* -u
- -as ↔ -ant-: *ĉu vi manĝas?* ↔ *ĉu vi estas manĝanta?* -ant-
- -as ↔ -ant-: *ĉu vi komencas lerni Esperanton?* ↔ *ĉu vi estas komencanto?*
- -as ↔ -at-: *kiun libron vi plej ŝatas?* ↔ *kiu estas via plej ŝatata libro?* -at-
- – ↔ -iĝ-: *ni komencas la ludon.* ↔ *la ludo komenciĝas.* -iĝ-

7 Regulo 7: Adverboj

La adverba finaĵo estas -*e*.[27]

- bone: *en bona maniero, laŭ bona maniero*
- trajne: *en trajno, per trajno*
- hejme: *en sia hejmo, ĉe sia hejmo*
- matene: *en la mateno, dum la mateno*

7.1 Konstato: *jes*, *ne* kaj *mal*

En Esperanto Fajnigita, la adverbo *jes* indikas konstaton, dum *ne* indikas malkonstaton.

- *Ŝi jes vidis lin.*
- *Ŝi ne vidis lin.*

En Esperanto Fajnigita, la adverbo *mal* signifas *tute ne*.

- *Ŝi mal vidis lin.* (Ŝi tute ne vidis lin.)

7.2 -' *al* kaj *aŭ*

7.2.1 -' *al* ĉe Adverboj

En Esperanto Fajnigita oni povas ellasi la finaĵon -*e* por anstataŭe aldoni la prepozicion *al*.

- dank' al: *danke al, kun danko al*

Tiel farante oni formas prepoziciecan konstruon. En Esperanto Fajnigita eblas anstataŭi la kvazaŭfinaĵon -' *al* per la ŝajnfinaĵo -*aŭ*, tiel formante prepozicion.

- dankaŭ: *danke al, kun danko al, dank' al*

Enkondukante novan prepozicion, oni atentu, ĉu ĝi finiĝas per pli ol unu konsonanto. Se jes, oni uzu la ŝajnsufikson -*aŭ* aŭ elektu pli simplan formon. Nur du prepozicioj en Tradicia Esperanto ne laŭas tiun skemon. En Esperanto Fajnigita ili adaptiĝas.

- pos: *post*
- tras: *trans*

[27] Oni povas klasi adverbon instrumentalo aŭ lokativo, se la origina formo estas o-vorto.

7.2.2 -*aŭ* en Prepozicioj

En Esperanto Fajnigita la ŝajnfinaĵo -*aŭ* en prepozicioj povas anstataŭiĝi per adverba elizio kombine kun la prepozicio *al*.

- anstat' al, anstate al, kun anstato al: *anstataŭ*
- ant' al, ante al, kun anto al: *antaŭ*
- ĉirk' al, ĉirke al, kun ĉirko al: *ĉirkaŭ*
- kontr' al, kontre al, kun kontro al: *kontraŭ*
- malgr' al, malgre al, kun malgro al: *malgraŭ*

Tiel farante oni implicas novajn verbajn formojn, ekzemple *ĉirki* (t. e. *provizi per ĉirko / ĉirkaŭigi*).

- anstati: *anstataŭigi*[28]
- anti: *"antaŭigi"*
- ĉirki: *ĉirkaŭigi*[29]
- kontri: *"kontraŭigi"*
- malgri: *"malgraŭigi"*

7.2.3 -*aŭ* en Adverboj

Adverboj, kiuj havas la ŝajnfinaĵon -*aŭ* havas anstataŭe la adverban finaĵon -*e* en Esperanto Fajnigita.[30]

- adie: *adiaŭ*
- almene: *almenaŭ*
- ambe: *ambaŭ*[31]
- anke: *ankaŭ*
- ankore: *ankoraŭ*
- apene: *apenaŭ*
- balde: *baldaŭ*
- hiere: *hieraŭ*
- hodie: *hodiaŭ*
- kvaze: *kvazaŭ*

[28] anstat: *anstataŭig' al*

[29] ĉirke -n: *ĉirkaŭigante -n, ĉirkaŭ -n*

[30] En Tradicia Esperanto, oni ne rajtas disigi la ŝajnfinaĵon -*aŭ*, tamen tio okazas en la lingvouzo, kiam oni diras *baldegaŭ* anstataŭ *baldaŭege*. Vidu ĉe 12.1.

[31] *ambe* ofte uziĝas kiel adjektivo (ambaj manoj: *ambaŭ manoj*)

- morge: *morgaŭ*
- preske: *preskaŭ*

Enkondukante novan adverbon, oni atentu, ĉu ĝi finiĵas per pli ol unu konsonanto. Se jes, oni uzu la ŝajnsufikson *-aŭ* respektive en Esperanto Fajnigita la adverban finaĵon *-e*.

- erste (erstaŭ, *erst): *nur* (tempe)
- hik (*hike, *hikaŭ): *ĉi tie*
- sempre (sempraŭ, *sempr): *ĉiam*

7.2.4 *-aŭ-* en Verboj

En Esperanto Fajnigita, la sufikso *-aŭ-* eksplicite indikas instrumentecon. Verbo kun la sufikso *-aŭ-* signifas *esti -o al*.

- *Ŝi kovris la tablon per tuko.*
- *La tuko kovras la tablon.* $\xrightarrow{-a\breve{u}}$ *La tuko kovraŭas la tablon.*[32]

7.2.5 Ekzercigoj kaj Distingigoj

- -a ↔ -e: *frua alveno* ↔ *frue alveni* -e
- per ↔ -e: *per trajno* ↔ *trajne* per

Demandi manieron: "Kiel vi alvenis?" kiel

Demandi farton: "Kiel vi fartas?"

Demandi nomon: "Kiel vi nomiĝas?"

[32] t. e. *La tuko estas kovro al la tablo.*

8 Regulo 8: Prepozicioj

En Esperanto Fajnigita eblas formi prepozicion el verbo, uzante nur ties radikon.[33]

- *Ŝi tajpas konante la dekfingran sistemon.* → *Ŝi tajpas kon la dekfringra sistemo.*
- *Mi erare salutis lin anstataŭ ŝi.* → *Mi salutis lin mis ŝi.* (Mi salutis lin maltrafante ŝin.)
- *Mi prenis lin por fremdulo.* → *Mi prenis lin mis' al fremdulo.* (Mi prenis lin maltrafinte fremdulon.)

En Esperanto Fajnigita, eblas uzi prepozicion sen argumento.

- *Ŝi trinkis ankoraŭ iom da akvo.* → *Ŝi trinkis ankoraŭ iom da.*
- *Ĝis la revido!* → *Ĝis!*

8.1 Alto

8.1.1 *super* kaj *sub*

La prepozicio *super* signifas *pli alte ol*, dum *sub* signifas *malpli alte ol*.

- *La birdo flugas super la arbaro.*
- *La birdo flugas sub la nuboj.*

8.1.2 *sor*, *sur* kaj *sob*

En Esperanto Fajnigita, la prepozicio *sor* signifas *ĉe la supro de*, dum *sur* signifas *ĉe la bazo de*. En Esperanto Fajnigita, la prepozicio *sob* signifas *ĉe la infro de*[34].

8.2 Flanko kaj Surfaco

8.2.1 *apud* kaj *an*

La prepozicio *apud* signifas *ĉe la flanko de*. En Esperanto Fajnigita, la prepozicio an signifas *tuŝante la flankon de*.

- *La ŝtupetaro staras apud la muro.*
- *La ŝtupetaro apogiĝas an la muro.* (t. e. tuŝante flankon de la muro)
- *La bildo pendas an la muro.* (t. e. tuŝante flankon de la muro)

[33] La neoficiala prepozicio *far* estas tial evitinda en Esperanto Fajnigita, ĉar ĝi ne indikus tiun, kiu plenumas agon, sed tion, kio estas farata.

[34] *infro* samsignifas al *subbazo*.

8.2.2 *na* kaj *pri*

En Esperanto Fajnitiga, la prepozicio *na* signifas *en la surfaco de*. Ĝi estas uzebla por esprimi la medion, per kiu oni plenumas agon. La prepozicio *pri* signifas *super la surfaco de*.[35]

- *Ŝi aspektis bele na la foto.*
- *Ŝi ludis na la gitaro.*
- *Ŝi laboris pri la problemo.*

8.3 Sfero, Cirklo kaj Linio

8.3.1 *um' al* kaj *ĉirkaŭ*

En Esperanto Fajnigita, eblas distingi inter sfero aŭ cirklo kontinua (ekzemple barilo ĉirkaŭ parko) kaj sfero aŭ cirklo malkontinua (ekzemple vico da arboj ĉirkaŭ parko).

- *umo* (t. e. sfero aŭ cirklo kontinua)
- *ĉirko* (t. e. sfero aŭ cirklo malkontinua)

En Esperanto Fajnigita, la verboj *umi* kaj *ĉirki* signifas *ĉirkaŭigi per sfero aŭ cirklo kontinua* respektive *malkontinua*.

- *Oni umis la parkon per barilo.* (Oni ĉirkaŭigis la parkon per barilo.)
- *Oni ĉirkis la parkon per arboj.* (Oni ĉirkaŭigis la parkon per arboj.)

En Esperanto Fajnigita, la prepozicioj *umaŭ*[36] kaj *ĉirkaŭ* indikas sferon aŭ cirklon kontinuan respektive malkontinuan.

- *La barilo staras umaŭ la parko.*
- *La arboj staras ĉirkaŭ la parko.*

-*um*- por kovro aŭ ĉirkaŭo: Eblas uzi -*um*- kiel sufikson. Ĝi signifas *kovro* aŭ *ĉirkaŭo*.

- *brakumi* (t. e. kovri per brakoj)
- *kolumo* (t. e. kovro por la kolo)
- *proksimume* (t. e. ĉe proksima ĉirkaŭo)

[35] En moderna lingvouzo, oni foje uzas *na* anstataŭ akuzativo, aŭ por indiki akuzativon, kiam ĝi ne estas esprimebla per *-n*. En Esperanto Fajnigita, *na*, samkiel en la pola, signifas *en la surfaco de*, dum *in* signifas *kun tuŝo al*. Tial *in* ŝajnas pli tauĝa anstataŭilo ol *na* en Esperanto Fajnigita. Vidu ĉe 2.1.4, 14.

[36] respektive *um' al*

-*um*- por ĉirkaŭiro aŭ iteracio: Pli vaste, ĝi signifas ankaŭ *ĉirkaŭiro*, *iteraciero*.

- *foliumi* (t. e. levi kaj mallevi paĝon de unu flanko al alia flanko)
- *palpebrumi* (t. e. fermi kaj malfermi okulon)

-*um*- por pasigo de libertempo: Ankoraŭ pli vaste, -*um*- signifas *pasigon de (liber-)tempo*.

- *tendumi* (t. e. pasigi libertempon en tendoj)
- *kafumi* (t. e. pasigi libertempon ĉe kafo)
- *komputilumi* (t. e. pasigi libertempon per komputilo)

-*um*- por sistemo, funkcio aŭ institucio: La sufikso -*um*- ankaŭ signifas sistemon, funkcion aŭ institucion.

- *operaciumo* (t. e. operacia sistemo)
- *rapidumo* (t. e. akcelgrada funkcio)

-*um*- por rimedo kaj mortpuno: Krome, la sufikso -*um*- povas signifi aplikon de rimedo, ankaŭ de mortpuno.

- *sunumi* (t. e. apliki sunon)
- *ventumi* (t. e. apliki venton)
- *pendumi* (t. e. mortpuni per pendigo)
- *kvaronumi* (t. e. mortpuni per kvaronigo)

8.3.2 *fra*

En Esperanto Fajnigita, la prepozicio *fra* signifas *ĉirkaŭata de*.

- *La parko situas fra barilo.*
- *La parko situas fra arboj.*

8.3.3 *en*, *ekster* kaj *el*

La prepozicio *en* signifas *ĉe la interno de*, dum *ekster* signifas *ĉe la eksterno de*[37]. La prepozicio *el* signifas *de la interno al la eksterno de*.

8.3.4 *inter* kaj *krom*

En Esperanto Fajnigita, la prepozicio *inter* signifas *ĉe la intro*, dum *krom* signifas *ĉe la ekstro*[38].

[37] *interno* kaj *eksterno* samsignifas al *eno* kaj *ekstero*.
[38] *intro* kaj *ekstro* samsignifas al *intero* kaj *kromo*.

8.4 Tempo

8.4.1 *dum*, *pre* kaj *pos*

La prepozicio *dum* indikas tempon.

- *Dum la somero, miaj gepatroj ferias.*

En Esperanto Fajnigita, la prepozicio *pre* indikas antaŭan tempon, dum *pos*[39] indikas postan tempon.

- *antaŭ la somero → pre la somero*
- *post la somero → pos la somero*

8.4.2 *antaŭ*

En loka senco, konsilindas *antaŭ* ol *pre*, respektive *malantaŭ* ol *pos*.

- *pre la domo → antaŭ la domo*
- *pos la domo → malantaŭ la domo*

8.4.3 *komenc* kaj *fin*

En Esperanto Fajnigita, la prepozico *komenc* indikas tempon komencatan, dum *fin* indikas tempon finatan.[40]

- *komenc la koncerto* (t. e. kiam oni komencas la koncerton)
- *fin la koncerto* (t. e. oni finas la koncerton)

8.4.4 *ek* kaj *ĉes*

En Esperanto Fajnigita, la prepozicio *ek* indikas tempon komenciĝantan, dum *ĉes* indikas tempon finiĝantan.[41]

- *ek la koncerto* (t. e. kiam la koncerto komenciĝas)
- *ĉes la koncerto* (t. e. kiam la koncerto finiĝas)

8.5 Utilo

8.5.1 *por* kaj *kontraŭ*

En Esperanto Fajnigita, la prepozicio *por* indikas fruktuzanton, dum *kontraŭ* indikas viktimon.

- *Ŝi koncertas por la najbaroj.*
- *Ŝi batalas kontraŭ la majusto.*

[39] La formo *pos* estas konsilinda ol *post* en Esperanto Fajnigita. Vidu ĉe 7.2.1.
[40] *komenc* kaj *fin* signifas *komencante -n* respektive *finante -n*
[41] *ek* kaj *ĉes* signifas *ĉe la eko de* respektive *ĉe la ĉeso de*

8.5.2 *za* kaj *re*

En Esperanto Fajnigita, la prepozicio *za* indikas atingon, dum *re* indikas trafon de celo. Alivorte, *za* indikas sukceson, dum *re* signifas koston.

- *Ŝi iris en la urbon za vestaĵoj.*
- *Ŝi aĉetis la ŝuojn re dek dolaroj.*

8.5.3 *dank' al* kaj *pro*

En Esperanto Fajnigita, la prepozicio *dank' al* indikas helpon, dum *pro* indikas kulpon.

- *La infanoj havas ŝuojn dank' al ŝi.*
- *La infanoj frostas pro la malvarmo.*

8.5.4 *voj* kaj *tras*

En Esperanto Fajnigita, la prepozicio *voj* indikas ponton, dum *tras*[42] indikas obstaklon.

8.5.5 *per* kaj *tra*

En Esperanto Fajnigita, la prepozicio *per* indikas solvon, dum *tra* indikas problemon.

8.5.6 *laŭ* kaj *preter*

En Esperanto Fajnigita, la prepozicio *laŭ* indikas apogon, dum *preter* indikas baron.

	+	-
motivo (fruktuzanto, viktimo)	*por*	*kontraŭ*
celo (atingo, trafo)	*za*	*re*
kaŭzo (helpo, kulpo)	*dank' al*	*pro*
angulo (ponto, obstaklo)	*voj*	*tras*
rimedo (solvo, problemo)	*per*	*tra*
limo (apogo, baro)	*laŭ*	*preter*

Tabelo 14: Utilo

[42] En Esperanto Fajnigita, la formo *tras* estas konsilinda ol *trans*. Vidu ĉe 7.2.1.

8.6 Distanco kaj Proksimo

8.6.1 *ab* kaj *ĝis*, *de* kaj *al*, *par* kaj *in*

En Esperanto Fajnigita, la prepozicioj *de* kaj *al* indikas distanciĝon respektive proksimiĝon, dum la prepozicioj *par* kaj *in* indikas maltuŝon respektive tuŝon. Vidu ĉe 2.1.2, 2.1.3, 2.1.4, 13.

- *Mi iras de la festo.* (Mi distanciĝas de la festo.)
- *Mi iras al la festo.* (Mi proksimiĝas al la festo.)

En Esperanto Fajnigita, la prepozicio *ab* indikas distanciĝon post maltuŝo. Kontraste, la prepozicio *ĝis* indikas tuŝon post proksimiĝo.



Tabelo 15: *ab* kaj *ĝis*

8.6.2 *da* kaj *do*, *di* kaj *vic*

En Esperanto Fanigita, la prepozicioj *di* kaj *vic* indikas tendencon al la origino respektive al la celo.

- *prezidanto vic ofico → vicprezidanto*
- *libro de mia amiko → libro di mia amiko*

En Esperanto Fajnitiga, la prepozicio *da* indikas tendencon al la origino post distanciĝo post maltuŝo. Kontraste, la prepozicio *do* indikas tuŝon post proksimiĝo post tendenco al la celo.

- *glaso da vino*
- *akvo do vino*



Tabelo 16: *da* kaj *do*

En Esperanto Fajnigita, la prepozicio *da* signifas *origine estante* kaj do povas anstataŭi la tabelvorton *kiel* kun nominativo.

- *Mi elektis lin kiel prezidanto. → Mi elektis lin da prezidanto.*

En Esperanto Fajnigita, la prepozicio *do* signifas *cele estante* kaj do povas anstataŭi la tabelvorton *kiel* kun akuzativo.

- *Mi elektis lin kiel prezidanton.* → *Mi elektis lin do prezidanto.*

La prepozicio *da* estas uzata por formi partitivojn.

- *Mi trinkis unu glason da akvo.*

En Esperanto Fajnigita, la prepozicioj *da* kaj *do* povas roli kiel konjunkcioj. Tiam *da* signifas proksimume *ĉar*.

- *Da mi pensas, mi estas.* (Origine estante ke mi pensas, mi estas.)
- *Mi pensas, do mi estas.* (Mi pensas, cele estante ke mi estas.)

8.6.3 *dis* kaj *ko*, *for* kaj *ĉe*

En Esperanto Fajnigita, la prepozicioj *for* kaj *ĉe* indikas malaperon respektive aperon.

- *Mi estas for la festo.* (Mi malaperis de la festo.)
- *Mi estas ĉe la festo.* (Mi aperis al la festo.)

En Esperanto Fajnigita, la prepozicio *dis* indikas malaperon post tendenco al la origino post distanciĝo post maltuŝo. Kontraste, la prepozicio *ko* signifas tuŝon post proksimiĝo post tendenco al la celo post apero.



Tabelo 17: *dis*



Tabelo 18: *ko*

8.6.4 *sen* kaj *kun*, *eks* kaj *ra*

En Esperanto Fajnigita, la prepozicio *eks* indikas tendencon for de la origino. La prepozicio *ra* indikas tendencon for de la celo.

- *prezidanto eks ofico* → *eksprezidanto*
- *tablo el ligno* → *tablo ra ligno*

La prepozicio *kun* signifas *akompanata de*, dum *sen* signifas *ne akompanata de*. *kun* kaj *sen* signifas proksimume *ĉe* respektive *dis*, sed en socia senco.

- *Mi venis kun amikoj.* (Mi venis akompanate de amikoj.)
- *Mi venis sen amikoj.* (Mi venis neakompanate de amikoj.)



Tabelo 19: *sen*



Tabelo 20: *kun*

8.6.5 Ekzercigoj kaj Distingigoj

- sur ↔ super: *sur* ↔ *super*

Demandi pri loko: “Kie estas la taso?” / “Kie vi loĝas?” / “De kie vi venas?”



Tabelo 21: Prepozicioj pri distanco kaj proksimo

9 Regulo 9: Prononco

Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita.

Esperanto	IPA
a	[a]
b	[b]
c	[ʦ]
d	[d]
e	[ɛ]
f	[f]
g	[g]
h	[h]
i	[ɪ]
j	[j̯]
k	[k]
l	[l]
m	[m]
n	[n]
o	[ɔ]
p	[p]
r	[r]
s	[s]
t	[t]
u	[ʊ]
v	[v]
z	[z]
ĉ	[ʧ]
ĝ	[ʤ]
ĥ	[x]
ĵ	[ʒ]
ŝ	[ʃ̯]
ŭ	[w]

Tabelo 22: Esperantaj literoj kaj Internacia Fonetika Alfabeto

9.1 Literoj kaj Mallongigoj

La literoj prononciĝas kun la vokalo *-o*. Formante radikon el mallongigo, la *-o* estas skribata. Se la lasta litero de mallongigo estas konsonanto, ĝia *-o* ne estas parto de la radiko.

- *AIDS* $\xrightarrow{-o}$ *aidoso*
- *MJS* $\xrightarrow{-a}$ *mojosa*

10 Regulo 10: Akcento

La akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo. En Esperanto Fajnigita, oni rajtas uzi apostrofon por indiki akcenton sur la lasta silabo.

- *mi aŭ* → *miaŭ'*
- *ha lo* → *halo'*

10.0.1 Ekzercigoj kaj Distingigoj

- mateno ↔ matenmanĝo
- alia ↔ aliflanke

11 Regulo 11: Vortofarado

En Esperanto Fajnigita, la kategorio de radiko, t. e. ĝia uzo kiel substantivo aŭ verbo, estas determinata de mutaj sufiksoj. Foje ne estas eble decidi, ĉu la verba formo estas derivata de substantiva formo aŭ inverse.

- *formo* $\xrightarrow{-al-}$ *form[al]o* $\xrightarrow{-iz-}$ *form[aliz]i*[43]
- *formi* $\xrightarrow{-ac-}$ *form[ac]i* $\xrightarrow{-aĵ-}$ *form[acaĵ]o*[44]

11.1 Verboj el Substantivoj

11.1.1 *-il-* kaj *-uz-*

- *telefono* $\xrightarrow{-il-}$ *telefon[il]o* $\xrightarrow{-uz-}$ *telefon[iluz]i*[45]
- *biciklo* $\xrightarrow{-il-}$ *bicikl[il]o* $\xrightarrow{-uz-}$ *bicikl[iluz]i*

11.1.2 *-um-* kaj *-iz-*

- *oro* $\xrightarrow{-um-}$ *or[um]o* $\xrightarrow{-iz-}$ *or[umiz]i*[46]
- *kupro* $\xrightarrow{-um-}$ *kupr[um]o* $\xrightarrow{-iz-}$ *kupr[umiz]i*

11.1.3 *-al-* kaj *-iz-*

- *fino* $\xrightarrow{-al-}$ *fin[al]o* $\xrightarrow{-iz-}$ *fin[aliz]i*[47]
- *oriento* $\xrightarrow{-al-}$ *orient[al]o* $\xrightarrow{-iz-}$ *orient[aliz]i*
- *loko* $\xrightarrow{-al-}$ *lok[al]o* $\xrightarrow{-iz-}$ *lok[aliz]i*

11.1.4 *-aŭ-* kaj *-iz-*

- *kovro* $\xrightarrow{-aŭ-}$ *kovr[aŭ]o* $\xrightarrow{-iz-}$ *kovr[aŭiz]i*

11.1.5 *-aĵ-* kaj *-if-*

- *floro* $\xrightarrow{-aĵ-}$ *flor[aj]o* $\xrightarrow{-if-}$ *flor[aĵif]i*[48]

11.1.6 *-al-* kaj *-if-*

- *origino* $\xrightarrow{-al-}$ *origin[al]o* $\xrightarrow{-if-}$ *origin[alif]i*[49]
- *fronto* $\xrightarrow{-al-}$ *front[al]o* $\xrightarrow{-if-}$ *front[alif]i*[50]

[43] form[aliz]i: *provizi per forma parto*
[44] form[acaĵ]o: *rezulto de foja formado*
[45] telefon[iluz]i: *utiligi instrumenton por telefoni*
[46] or[umiz]i: *provizi per tavolo da oro*
[47] fin[aliz]i: *provizi per fina parto*
[48] flor[aĵif]i: *prezenti la produkton de florado*
[49] origin[alif]i: *prezenti la originan flankon*
[50] front[alif]i: *prezenti la frontan flankon*

11.1.7 -ec- kaj -if-

- *belo* $\xrightarrow{-ec-}$ *bel[ec]o* $\xrightarrow{-if-}$ *bel[ecif]i*[51]

11.2 Substantivoj el Verboj

11.2.1 -ac- kaj -aĵ-

- *konstrui* $\xrightarrow{-ac-}$ *konstru[ac]i* $\xrightarrow{-aĵ-}$ *konstru[acaĵ]o*[52]

11.2.2 -ad- kaj -aĵ-

- *flori* $\xrightarrow{-ad-}$ *flor[ad]o* $\xrightarrow{-aĵ-}$ *flor[adaĵ]o*[53]

11.2.3 -ac- kaj -ec-

- *ordi* $\xrightarrow{-ac-}$ *ord[ac]o* $\xrightarrow{-ec-}$ *ord[acec]o*[54]

11.2.4 -ad- kaj -ec-

- *sonori* $\xrightarrow{-ad-}$ *sonor[ad]o* $\xrightarrow{-ec-}$ *sonor[adec]o*[55]

11.3 Substantivoj el Substantivoj

En Espernato Fajnigita, estas konsilinde aldoni vokalon inter du radikoj por belsoneco.

- *farado* $\xrightarrow{-vort-}$ *vortofarado*

11.4 Sufiĉo kaj Neceso

Oni ne aldonu pli da vorteroj ol necese, kaj ne malpli ol sufiĉe.

- *finalizas* $\xleftarrow{-al-iz-}$ *finas*
- *akto* $\xleftarrow{-t-}$ *ago*
- *biciklilo* $\xleftarrow{-il-}$ *biciklo*
- *paŝacas* $\xleftarrow{-ac-}$ *paŝas*
- *vivado* $\xleftarrow{-ad-}$ *vivo*
- *kovraŭo* $\xleftarrow{-aŭ-}$ *kovro*
- *tri glasplenoj* $\xleftarrow{-plen-}$ *tri glasoj*

[51] bel[ecif]i: *prezenti la kvaliton de belo*
[52] konstru[acaĵ]o: *rezulto de foja konstruado*
[53] flor[adaĵ]o: *rezulto de daŭra florado*
[54] ord[acec]o: *kvalito el foja ordado*
[55] sonor[adec]o: *kvalito el daŭra sonorado*

12 Regulo 12: Korelativoj

La Regulo 12 estas pri negaj vortoj, kiaj estas tabelvortoj komenciĝantaj per *neni-*. La regulo esprimas, ke en nega frazo *ne* ne aperu redunde.

Tradicia Esperanto

- **Neniu ne venis.*
- *Neniu venis.*

12.1 Tradiciaj Tabelvortoj

Tabelvortoj estas korelativaj pronomoj en Tradicia Esperanto. Ili formiĝas per la ŝajnradikoj *ki-*, *ti-*, *ĉi-*, *neni-*, *i-* kaj la ŝajnfinaĵoj *-o*, *-a*, *-u*, *-es*, *-el*, *-al*, *-e*, *-am*, *-om*.

	demando	indiko	ĝeneraligo	nego	senspecifeco
speco	*kio*	*tio*	*ĉio*	*nenio*	*io*
kvalito	*kia*	*tia*	*ĉia*	*nenia*	*ia*
individuo	*kiu*	*tiu*	*ĉiu*	*neniu*	*iu*
aparteno	*kies*	*ties*	*ĉies*	*nenies*	*ies*
maniero	*kiel*	*tiel*	*ĉiel*	*neniel*	*iel*
kaŭzo	*kial*	*tial*	*ĉial*	*nenial*	*ial*
loko	*kie*	*tie*	*ĉie*	*nenie*	*ie*
tempo	*kiam*	*tiam*	*ĉiam*	*neniam*	*iam*
grado	*kiom*	*tiom*	*ĉiom*	*neniom*	*iom*

Tabelo 23: La tradiciaj tabelvortoj

Oni povas aldoni finaĵojn al tabelvortoj, ekzemple en *tiele* kaj *tiea*. Oni kontraste ne povas ellasi la tabevortan ŝajnfinaĵon (por diri **tie* anstataŭ *tiele*, **tia* anstataŭ *tiea*). Ne eblas uzi tabelvortan ŝajnfinaĵon kun aliaj radikoj.[56]

Tamen okazas konfuzoj, ĉar la tabelvortaj ŝajnfinaĵoj similas al la fundamentaj finaĵoj laŭ la Reguloj 2, 3, 6, 7, dum ili nur parte havas la saman uzon kaj signifon. Ekzemple, dum *tio*, *tia* kaj *tie* estas o-, a- kaj e-vortecaj, *tiu* ne estas verbo.

12.2 *kv-* en Refleksivaj Korelativoj

En Tradicia Esperanto oni ne distingas inter demandaj kaj refleksivaj tabelvortoj (ambaŭ havas la ŝajnprefikson *k-*). En Esperanto Fajnigita eblas distingi: demandaj korelativoj havas *k-*, kaj refleksivaj korelativoj havas *kv-*.

- *Kiu najbaro venis?*
- *Venis la najbaro, kviu loĝas apud ni.*

[56] En lingvouza Tradicia Esperanto oni tamen foje traktas tabelvortan ŝajnfinaĵon kvazaŭ efektiva finaĵo, ekzemple en **tiaĵo*, **neniaĵo*, **aliel*, **mies*. Vidu ĉe 7.2.3.

12.3 *c-* en Proksimindikaj Korelativoj

En Tradicia Esperanto oni uzas *ĉi* por indiki proksimajn al la parolanto aferojn. En Esperanto Fajnigita eblas uzi *c-* anstataŭe.

- *tiu ĉi / ĉi tiu*
- *ciu*

12.4 *n-* en Negaj Tabelvortoj

Laŭ Esperanto Fajnigita la tradiciaj negaj tabelvortoj komenciĝas per prefiksa *ne-*. Por ne lezi la Regulon 12, kiu malpermesas redundan *ne*, do necesas ellasi la prefikson *ne-*. Alternative, eblas uzi duan *ne* en la frazo, kio ŝajnas malbonstila sed nemalĝusta.

Esperanto Fajnigita

- **Neniu venis.*
- *Niu venis. / Neniu ne venis.*

12.5 *i-* en Nespecifaj Tabelvortoj

Laŭ Esperanto Fajnigita, la tabelvorta *-i-* estas ŝajnsufikso, kiu signifas nespecifecon. Ĝi kombiniĝas kun la tabelvortaj ŝajnfinaĵoj por formi la naŭ bazajn tradiciajn tabelvortojn *io*, *ia*, *iu*, *ies*, *iel*, *ial*, *ie*, *iam*, *iom*.[57]

Laŭ Esperanto Fajnigita, la tabelvortaj *k-*, *t-*, *ĉ* kaj *(ne-)n-* do estas ĉiuj efektivaj prefiksoj, kiuj uziĝas por krei la restantajn 36 tradiciajn tabelvortojn.

En Esperanto Fajnigita tial eblas kombini la tabelvortajn prefiksojn kun sinonimoj de la senspecifaj tabelvortoj por krei analogajn formojn. Ekzemple, ĉar *io* samsignifas al *aĵo*, *tio* samsignifas al *taĵo* k. t. p.

- *kaĵo: kio*
- *kula: kiu*

12.5.1 Tabelvortaj Sufiksoj

Kompreneble, la kombino estu bone prononcebla. Proponiĝas la uzo de sufiksoj kiel *-aĵ-* kaj *-ul-*, kiuj komenciĝas per vokalo. Tamen evidentiĝas, ke ne por ĉiu tabelvorta serio ekzistas tradicia sufikso por anstataŭi ĝin. Tial ĉi en Esperanto Fajnigita enkondukiĝas ĉi-celaj sufiksoj.

Eblas plia fajnigo: dum *kiel* signifas en Tradicia Esperanto *per kiu rimedo*, *en kiu maniero*, eblas en Esperanto Fajnigita *kile* kaj *keske* (aŭ ĝenerale *kece*).

- *kile: per kiu rimedo*
- *keske: en kiu maniero*
- *kece: kiel*

[57] Notu, ke ĉi nespecifaj tabelvortoj estas efektivaj, memstaraj vortoj en Tradicia Esperanto. Ili ne estas kunmetaĵoj.

	demando	refleksivo	indiko	ĝeneraligo	nego	senspecifeco
speco	*kaĵo*	*kvaĵo*	*taĵo*	*ĉaĵo*	*naĵo*	*aĵo*
kvalito	*keca*	*kveca*	*teca*	*ĉeca*	*neca*	*eca*
individuo	*kula*	*kvula*	*tula*	*ĉula*	*nula*	*ula*
aparteno	*kesma*	*kvesma*	*tesma*	*ĉesma*	*nesma*	*esma*
maniero	*kile*	*kvile*	*tile*	*ĉile*	*nile*	*ile*
kaŭzo	*kale*	*kvale*	*tale*	*ĉale*	*nale*	*ale*
loko	*keje*	*kveje*	*teje*	*ĉeje*	*neje*	*eje*
tempo	*keve*	*kveve*	*teve*	*ĉeve*	*neve*	*eve*
grado	*kude*	*kvude*	*tude*	*ĉude*	*nude*	*ude*

Tabelo 24: Fajnigitaj tabelvortoj

La signifo de *kale* estas pli vasta ol Tradiciesperanta *kial*. Dum *kial* demandas pri la kaŭzo, *kale* demandas pri la cirkonstancoj kaj do signifas *pri kio*.

- *kale: pri kio* (proksimume: *pro kio*)

Eblas ellasi la sufikson. Tio povas kaŭzi konfuzojn. Oni tial atentu la sekvantajn ambiguajn formojn.

- *kaj* ŝajnas rilati kun la Tradiciesperanta konjunkcio *kaj*.
- *kve* ŝajnas alternativo al la Tradiciesperanta konjunkcio *ke*.
- *ĉe* ŝajnas rilati kun la Tradiciesperanta prepozicio *ĉe*.
- *ne* ŝajnas esti Tradiciesperanta *ne*.
- *non* ŝajnas alternativo al *ne*.
- *a(n)* ŝajnas nedifina artikolo.

	demando	refleksivo	indiko	ĝeneraligo	nego	senspecifeco
-o	*ko*	*kvo*	*to*	*ĉo*	*no*	*o*
-a	*ka*	*kva*	*ta*	*ĉa*	*na*	*a*
-e	*ke*	*kve*	*te*	*ĉe*	*ne*	*e*

Tabelo 25: Fajnigitaj tabelvortoj sen sufikso

12.5.2 Alternativaj Korelativoj

Alternative al tabelvorto foje eblas propra korelativo.

- nun: ĉi tiam / tiam ĉi
- ajna: iu ajn
- sempraŭ: ĉiam
- omna: ĉiu

13 Reguloj 13: Direkto

Por indiki direkton, vorto ricevas la finaĵon de la akuzativo -*n*.

- *al tie → tien*
- *al hejme → hejmen*
- *al sur la tablo → sur la tablon*

En Esperanto Fajnigita, eblas anstataŭe la finaĵo -*m*.[58]

- *tien → tiem*
- *hejmen → hejmem*
- *sur la tablon → sur la tablom*

[58]Tiu uzo ne konsilindas, kiam oni efektive celas esprimi tuŝon aŭ atingon de celo. Tiam oni uzu, kiel en Tradicia Esperanto, -*n*. Vidu ĉe 2.1.3, 2.1.4, 8.6.1, 14.1.

14 Reguloj 14: Mezuro

En Esperanto Fajnigita, la prepozicio *je* havas specifan signifon. Ĝi indikas mezuron aŭ pasigon. Por aliaj uzoj, oni uzu alian prepozicion. Vidu ĉe 2.1.4, 8.2.2.

- *La planto kreskis je du centimetroj.* (t. e. pasigante du centimetrojn)

14.1 Akuzativo anstataŭ Prepozicio

En Tradicia Esperanto, eblas uzi la akusativan finaĵon *-n* anstataŭ la prepozicio *je*, se ne estas risko de miskompreno. En Esperanto Fajnigita, eblas anstataŭi ĉiun prepozicion per akuzativo, se ne estas risko de miskompreno. Vidu ĉe 2.1.4, 13.

- *ĝi kreskis je du centimetroj* → *ĝi kreskis du centimentrojn*
- *ili veturos ĝis Romo* → *ili veturos Romon*
- *li dancas kun knabino* → *li dancas knabinon*
- *ŝi iras sur strato* → *ŝi iras straton*
- *mi helpu al amiko* → *mi helpu amikon*

14.1.1 Ekzercigoj kaj Distingigoj

- al kiu loko ↔ kien: *al kiu loko vi iras?* ↔ *kien vi iras?* kien

Demandi direkton: “Kien vi iras?”

-en

Uzi -en: “Mi iras hejmen.”

14.1.2 Ekzercigoj kaj Distingigoj

- je ↔ -n: *je longa tempo* ↔ *longan tempon* je -n

Demandi mezuron: “Kiom longe vi atendis?”

Uzi -n: “Mi atendis je unu horo.” / “Mi atendis unu horon.”

15 Regulo 15: Radikfarado

Oni uzu la Esperantan vortofaradon antaŭ enkonduki novajn radikojn.

- *tragedio* $\xrightarrow{-a}$ *tragedia* $\xrightarrow{-eco}$ *tragedieco* $\xrightarrow{-a}$ *tragedieca*[59]

15.1 Neologismoj kaj Internacieco

Multaj neologismoj estas internaciaj, t. e. ili estas fremdaj vortoj komunaj al multaj lingvoj. Ili tamen ne estas tutmondaj kaj tial ne tute internaciaj. Unu fojon lernite, la gramatiko kaj vortofarado de Esperanto estas kaj restas pli internacia kaj tial preferinda ol ĉiu neologismo.[60]

- hospitalo: *malsanulejo*
- kanono: *pafilego*
- tragika: *tragedieca*
- trajno: *vagonaro*

Neologismoj ŝajnas malaportunaj, kiam ilia celo estas **eviti** la Esperantan vortofaradon, ekzemple la uzon de la prefikso *mal-*.

- desperas: *malesperas*
- hida: *malbela*
- kurta: *mallonga*
- liva: *maldekstra*
- mava: *malbona*
- mikra: *malgranda*
- olda: *maljuna*
- pigra: *maldiligenta*
- povra: *malriĉa*
- streta: *mallarĝa*

Neologismoj ŝajnas des malpli oportunaj, se ili ne estas malpli longaj ol samsignifa fundamenta esprimo.

- desapontas: *elrevigas*

Multaj fakterminoj estas neologismoj baziĝantaj sur la latina (kaj sekve ofte la greka) lingvo. Ili uzas latinajn vorterojn, kiuj estas ŝajnvorteroj en Esperanto. Tiuj ŝajnvorteroj ofte kaŭzas ŝanĝojn en la prononco (kaj sekve en la skribo).

[59] Tamen, oni uzas *tragika* anstataŭ *tragedieca* aŭ *tragedia*. Tiu uzo ŝajnas evitinda.
[60] En poezio kaj scienca slango tiu konsidero ne estas aktuala.

15.2 Ŝajnsufiksoj

15.2.1 *-al-* en Radiko

La ŝajnvortero *-al-* estas uzata por formi adjektivon aŭ substantivon, kiu signifas *parton*, *flankon*, *apartenon*.

- *ag/* $\xrightarrow{-t-}$ *akt/* $\xrightarrow{-al-}$ *aktual/*[61]
- *fin/* $\xrightarrow{-al-}$ *final/*[62]

15.2.2 *-ari-* en Radiko

La ŝajnvortero *-ari-* estas uzata por formi substantivon, kiu signifas *ricevanton*.

- *konfes/* $\xrightarrow{-ari-}$ *konfesari/*[63]
- *milion/* $\xrightarrow{-ari-}$ *milionari/*[64]
- *sekret/* $\xrightarrow{-ari-}$ *sekretari/*[65]
- *vic/* $\xrightarrow{-ari-}$ *vikari/*[66]

15.2.3 *-i-* en Radiko

La ŝajnvortero *-i-* estas uzata por formi substantivon, kiu signifas *distribuon*, *sistemon*, *socion*. Notu, ke *-i-* en la senco de *socio* do ne samsignifas al *-uj-* en al senco de *lando*. Specife, *Esperantio* estas la (reale ekzistanta) Esperantokomunumo, dum *Esperantujo* estas la (ideala aŭ metafora) Esperantolando.

- *ag/* $\xrightarrow{-t-}$ *akt/* $\xrightarrow{-i-}$ *akci/*[67]
- *form/* $\xrightarrow{-t-}$ *format/* $\xrightarrow{-i-}$ *formaci/*[68]
- *vid/* $\xrightarrow{-t-}$ *viz/* $\xrightarrow{-i-}$ *vizi/*[69]
- *telefon/* $\xrightarrow{-i-}$ *telefoni/*[70]
- *filozof/* $\xrightarrow{-i-}$ *filozofi/*[71]
- *Esperant/* $\xrightarrow{-i-}$ *Esperanti/*[72]

[61] aktuala: *"agumapartena"*
[62] finalo: *"finparto"*
[63] konfesario: *"ricevanto de konfesoj"*
[64] milionario: *"ricevanto de milionoj"*
[65] sekretario: *"ricevanto de sekretoj"*
[66] vikario: *"ricevanto de la vico"*
[67] akcio: *"agumdistribuo"*
[68] formacio: *"formumdistribuo"*
[69] vizio: *"vidumdistribuo"*
[70] telefonio: *"telefonsistemo"*
[71] filozofio: *"filozofsocio"*
[72] Esperantio: *"Esperantosocio"*

15.2.4 *-if-* en Radiko

La ŝajnvortero *-if-* estas uzata por formi adjektivon, kiu signifas *prezenton de speco aŭ kvalito.*

- *spec/* $\xrightarrow{-if-}$ *specif/*[73]

15.2.5 *-ik-* en Radiko

La ŝajnvortero *-ik-* estas uzata por formi verbon, kiu signifas *prezentigon de speco aŭ kvalito.*

- *spec/* $\xrightarrow{-if-}$ *specif/* $\xrightarrow{-ik-}$ *specifik/*[74]

La ŝajnvortero *-ik-* estas uzata ankaŭ por formi substantivon, kiu signifas *arton*, *sciencon.*

- *muz/* $\xrightarrow{-ik-}$ *muzik/*[75]
- *lingv/* $\xrightarrow{-ist-}$ *lingvist/* $\xrightarrow{-ik-}$ *lingvistik/*[76]

15.2.6 *-itat-* en Radiko

La ŝajnvortero *-itat-* estas uzata por formi substantivon, kiu signifas *kvaliton.*

- *univers/* $\xrightarrow{-itat-}$ *universitat/*[77]

15.2.7 *-iv-* en Radiko

La ŝajnvortero *-iv-* estas uzata por formi adjektivon aŭ substantivon, kiu signifas *prezenton de foja ago.* Vidu ĉe 6.1.1.

- *ag/* $\xrightarrow{-t-}$ *akt/* $\xrightarrow{-iv-}$ *aktiv/*[78]

15.2.8 *-iz-* en Radiko

La ŝajnvortero *-iz-* estas uzata por formi verbon, kiu signifas *provizon*, *asignon.*

- *karakter/* $\xrightarrow{-iz-}$ *karakteriz/*[79]

15.2.9 *-nt-* en Radiko

La ŝajnvortero *-nt-* estas uzata por formi adjektivon aŭ substantivon, kiu signifas *plenumanton de daŭra ago.*

- *stud/* $\xrightarrow{-nt-}$ *student/*[80]

[73] specifa: *"specoprezenta"*
[74] specifikas: *"specoprezentigas"*
[75] muziko: *"muzarto"*
[76] lingvistiko: *"lingvistscienco"*
[77] universitato: *"universeco"*
[78] aktiva: *"agumprezenta"*
[79] karakterizi: *"asigni karakteron"*
[80] studento: *"studanto"*

15.2.10 *-olog-* en Radiko

La ŝajnvortero *-olog-* estas uzata por formi substantivon, kiu signifas *scienciston*.

- *radi/* $\xrightarrow{-olog-}$ *radiolog/*[81]

15.2.11 *-on-* en Radiko

La ŝajnvortero *-on-* estas uzata por formi substantivon, kiu signifas *ekzempleron*, *elementon*.

- *leg/* $\xrightarrow{-t-}$ *lekt/* $\xrightarrow{-i-}$ *lekci/* $\xrightarrow{-on-}$ *lecion/*[82]

15.2.12 *-or-* en Radiko

La ŝajnvortero *-or-* estas uzata por formi substantivon, kiu signifas *plenumanton de foja ago*.

- *ag/* $\xrightarrow{-t-}$ *akt/* $\xrightarrow{-or-}$ *aktor/*[83]
- *mov/* $\xrightarrow{-t-}$ *mot/* $\xrightarrow{-or-}$ *motor/*[84]

15.2.13 *-oz-* en Radiko

La ŝajnvortero *-oz-* estas uzata por formi adjektivon aŭ substantivon, kiu signifas *havon*.

- *vir/* $\xrightarrow{-t-}$ *virt/* $\xrightarrow{-oz-}$ *virtuozo/*[85]

15.2.14 *-t-* en Radiko

La ŝajnvortero *-t-* estas uzata por formi substantivon, kiu signifas *agon kiel unu fojon, unu paŝon, unu plenumon, unu prezenton*.

- *ag/* $\xrightarrow{-t-}$ *akt/*[86]
- *form/* $\xrightarrow{-t-}$ *format/*[87]

La ŝajnvortero *-t-* estas uzata ankaŭ por formi adjektivon, kiu signifas *plenumitecon*.

- *solv/* $\xrightarrow{ab-}$ *absolv/* $\xrightarrow{-t-}$ *absolut/*[88]

La ŝajnvortero *-t-* estas uzata ankaŭ por formi verbon, kiu signifas *ripeton*.

- *dir/* $\xrightarrow{-t-}$ *dikt/*[89] $\xrightarrow{-t-}$ *diktat/*[90]

[81] radiologo: *"radisciencisto"*
[82] leciono: *"legumdistribuekzemplero"*
[83] aktoro: *"agumanto"*
[84] motoro: *"movumanto"*
[85] virtuozo: *"virumhavulo"*
[86] akto: *"agumo"*
[87] formato: *"formumo"*
[88] absoluta: *"dissolvita"*
[89] diktas: *"dirumas"*
[90] diktatoro: *"dirumadanto"*

15.2.15 *-ud-* en Radiko

La ŝajnvortero *-ud-* estas uzata por formi substantivon, kiu signifas *kvaliton de rezulto*.

- *alt/* $\xrightarrow{-t-}$ *altit/* $\xrightarrow{-ud-}$ *altitud/*[91]

15.2.16 *-ur-* en Radiko

La ŝajnvortero *-ur-* estas uzata por formi substantivon, kiu signifas *rezulton*.

- *skulpt/* $\xrightarrow{-ur-}$ *skulptur/*[92]
- *nask/* $\xrightarrow{-t-}$ *nat/* $\xrightarrow{-ur-}$ *natur/*[93]

15.3 Ŝajnprefiksoj

15.3.1 *ab-* en Radiko

La ŝajnvortero *ab-* signifas *dis-*, *de-*.

- *solv/* $\xrightarrow{ab-}$ *absolv/*[94]

15.3.2 *al-* en Radiko

La ŝajnvortero *al-* signifas *al-* kaj alprenas la formojn *ad-* kaj *a-*.

- *lud/* $\xrightarrow{al-}$ *alud/*[95]

15.3.3 *be-* en Radiko

La ŝajnvortero *be-* signifas *pri-*, *dediĉon*.

- *daŭr/* $\xrightarrow{be-}$ *bedaŭr/*[96]

15.3.4 *de-* en Radiko

La ŝajnvortero *de-* signifas *de-* kaj *plenumon* kaj alprenas la formojn *de-* kaj *di-*.

- *fin/* $\xrightarrow{de-}$ *difin/*[97]

15.3.5 *el-* en Radiko

La ŝajnvortero *el-* signifas *el-* kaj alprenas la formojn *e-* kaj *eks-*.

- *volv/* $\xrightarrow{el-}$ *evolu/*[98]
- *ven/* $\xrightarrow{el-}$ *even/* $\xrightarrow{-t-}$ *event/*[99]

[91] altitudo: *"altigiteco"*
[92] sulpturo: *"skulptaĵo"*
[93] naturo: *"naskumaĵo"*
[94] absolvas: *"dissolvas"*, *"desolvas"*
[95] aludas: *"alludas"*
[96] bedaŭras: *"dediĉas daŭron"*
[97] difinas: *"plenfinas"*
[98] evoluas: *"elvolviĝas"*
[99] evento: *"elvenumo"*

15.3.6 *in-* en Radiko

La ŝajnvortero *in-* signifas *tuŝon* kaj alprenas la formojn *in-*, *im-* kaj *i-*. Vidu ĉe 2.1.4.

- *form/* $\xrightarrow{in-}$ *inform/*[100]

15.3.7 *inter-* en Radiko

La ŝajnvortero *inter-* signifas *inter-* kaj alprenas la formojn *inter-* kaj *inte-*.

- *leg/* $\xrightarrow{inter-}$ *intelig/* $\xrightarrow{-nt-}$ *inteligent/*[101]
- *est/* $\xrightarrow{inter-}$ *interes/*[102]

15.3.8 *re-* en Radiko

La ŝajnvortero *re-* signifas *re-*, *retro-*, *denove* kaj alprenas la formojn *re-* kaj *ri-*.

- *pet/* $\xrightarrow{re-}$ *ripet/*[103]

15.4 Ŝajnradikoj

Malprefiksante kaj malsufiksante radikon kaj konsultante latinan vortaron oni povas dedukti la ŝajnradikon, kiu foje estas identa kun Esperanta vorto, sed ofte ne.

- *dat/* $\xleftarrow{-t-}$ *d/*[104]
- *konstru/* $\xleftarrow{ko-}$ *stru/*[105]
- *faktur/* $\xleftarrow{-ur-}$ *fakt/* $\xleftarrow{-t-}$ *fac/*[106]
- *fikci/* $\xleftarrow{-i-}$ *fikt/* $\xleftarrow{-t-}$ *fing/*[107]
- *fraktur/* $\xleftarrow{-ur-}$ *frakt/* $\xleftarrow{-t-}$ *frang/*[108]
- *indik/* $\xleftarrow{in-}$ *dik/*[109]
- *interes/* $\xleftarrow{inter-}$ *es/*[110]
- *kaz/* $\xleftarrow{-t-}$ *kad/*[111]

[100] informas: *"formas in"*, *"tuŝformas"*
[101] inteligenta: *"interleganta"*
[102] interesa: *"interestiga"*
[103] ripetas: *"repetas"*, *"redemandas"*, *"rediras"*, *"refaras"*
[104] "das": *donas*
[105] "struas": *stakigas*
[106] "facas": *faras*
[107] "fingas": *ŝajnigas*
[108] "frangas": *rompas*
[109] "dikas": *montras*
[110] "esas": *estas*
[111] "kadas": *falas*

- $konduk/ \xleftarrow{ko-} duk/$[112]
- $misi/ \xleftarrow{-i-} mis/ \xleftarrow{-t-} met/$[113]
- $pozitiv/ \xleftarrow{-iv-} pozit/ \xleftarrow{-t-} pon/$[114]
- $staci/ \xleftarrow{-i-} stat/ \xleftarrow{-t-} st/$[115]
- $transitiv/ \xleftarrow{-iv-} transit/ \xleftarrow{trans-} it/ \xleftarrow{-t-} i/$[116]
- $verdikt/ \xleftarrow{ver-} dikt/ \xleftarrow{-t-} dic/$[117]

15.4.1 Ekzercigoj kaj Distingigoj

- tragedia ↔ tragika

[112] "dukas": *gvidas*
[113] "metas": *sendas*
[114] "ponas": *metas*
[115] "stas": *staras*
[116] "ias": *iras*
[117] "dicas": *diras*

16 Regulo 16: Nomoj

Oni povas elizi la *-o* de o-vorto.

- *domo → dom'*

Oni povas ellasi la apostrofon de elizio, se la o-vorto estas nomo. Oni tiam ofte "forgesas" la Esperantan akcenton, ĉar oni tiel ja citas nomon el al originala lingvo.

- *Zamenhofo → Zamenhof' → Zamenhof*

En Esperanto Fajnigita, eblas ellasi la akuzativan finaĵon *-n* ĉe nomo.

- *Mi salutis S-ron Ŝiller.*
- *Mi konas la kategorion B.*[118]

En Esperanto Fanigita, eblas ellasi ankaŭ la finaĵon *u* kaj de vokativa substantivo kaj de imperativa verbo.

- *amiku! → amik'!*
- *venu! → ven'!*

16.0.2 Ekzercigoj kaj Distingigoj

- Zamenhof' ↔ Zamenhof

[118] Sed: *Mi konas la B-an kategorion.*

Citaĵoj

[1] de Beaufront, L.: *Kompleta Gramatiko Detaloza di la Linguo Internacia-ona Ido.* Editerio Krayono, dil Ido-Societo Hispana, 2004

[2] Esperema, Prof. V.: *Adjuvilo — Internacia Helplingvo.* Roy McCoy, 2010

[3] Zamenhof, L. L.: *Fundamento de Esperanto.* Edistudio, 1991